



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

112-a jaro • n-ro 1340 (11) | novembro 2019

Esperanto dum POL'and'ROCK | 228

Nova vento venis en Koreion! | 232

山东世界语俱乐部
Shandong-a Esperanto-Klubo

Forpasis Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof (1925-2019) | 224

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establitita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševčenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto
Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044
faks.: +31 10 436 1751
<http://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifoj (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimume €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam

Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,

BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en

Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org




Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ

Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044 faks.: +31-10-436-1751
uea@co.uea.org www.uea.org

Enhavo



219

Malferme | Universala Kongreso

Orlando E. Raola kaj Humphrey Tonkin
malfermas la numeron per la artikoloj
"Elane al daŭripova evoluiĝo: Preparoj
por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto
en Montrealo" kaj "Montrealo:
Novstila pritrakto de la kongresa temo!"



222

Instruista trejnado en Poznano – kiel plu?

Katalin Kováts, kursgvidanto el Nederlando,
rakontas pri la nuna stato de Instruistaj
trejnadaj en la Adam Mickiewicz-Universitato
en Poznano, Pollando.



228

Esperanto dum POL'and'ROCK

Transformado de Laborteamo por Multkultura
Vilaĝo Esperanto dum POL'and'ROCK –
atendado de novaj aktivuloj,
freŝaj ideoj, novaj monfontoj...



232

Nova vento venis en Koreion!

Inhye Gim priskribas siajn impresojn pri
la 51-a Korea Kongreso de Esperanto,
kiu okazis en la urbo Jinju.

Landa agado | 221
Renkonte al la Tago de Esperanto en la 2760-jara Samarkando

Forpasis Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof | 224
Rememore pri Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof

Eventoj | 226
Freŝa vento blivas en Kroatio

Afriko brilas | 230
Instituto Zamenhof: eko de la lernojaro 2019–2020

UEA | 231
Almenaŭ 750 NRO-oj en Ĝenevo

Eventoj | 233
Ekspozicio "Leteroj de la mondo"

Landa agado | 234
Negrande sed promesplene

Lingvo | 235
Nia alfabeto

Recenzo | 235
Manlibreto por kompreno de la realo

Esperanta klasikaĵo pri homa lingvo | 236

Laste Aperis | 237

Alvoko al partopreno en la 71-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020 | 238

Furoraroj de la kongresa libroservo en Lahtio | 239
Oficiala Informilo

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Instruado, Rilatoj kun ILEI)
PO Box 100, Elsalh, IL 62028, Usono
Tel. +1 618 374 5252
uea-prezidanto@esperanto.org

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge Pedrosa Maia Jr.
(Centra Oficejo, Statuta Reformo, Eksteraj Rilatoj [krom Unesko], Ameriko, Rilatoj kun TEJO, Rilatoj kun Membro-Organizoj)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: S-ro Trezoro Huang Yinbao
(Financoj, Unesko)
Esperanto-Centro Ora Ponto
Jingchuan-Xian, Jinqiao Guojij, 744300 Pingliang, Ĉinio
Postel. +86-18893316800
trezoro@qq.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Ĝemelaj Urboj, Esperanto-Centroj, Eŭropo, Revuo Esperanto)
197 rue de Lourmel
FR-75015 Paris, Francio
Postel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: D-ro Orlando E. Raola
(Kulturo, Kongresoj, Biblioteko, Eldonado, Esploro kaj Dokumentado, Terminologio)
975 S Eliseo Drive, apt. 10, Greenbrae, CA 94904, Usono
Tel. +1-707-527-4660
oraola@gmail.com

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva (Afriko, Aktivula Maturigo)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu (Azio, Oceanio, Informado kaj Amikoj de Esperanto)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Hangang Bamsseo Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Membro: D-ro Amri Wandel (Scienca kaj Faka Agado, Meza Oriento kaj Norda Afriko, IKU)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Observantoj de TEJO:
S-ro Abel Johannes Kieft kaj s-ino Tran Thi Hoan (Gojo)

Observanto de ILEI:
S-ino Mirejo Grosjean

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



Elane al daŭripova evoluigo: Preparoj por la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo

Orlando E. Raola,
Estrarano de UEA

En aŭgusto 2020, esperantistoj el ĉiuj anguloj de la terglobo kunfluos al Montrealo, en la provinco Kebekio, Kanado, por okazigi la 105-an Universalan Kongreson de Esperanto. La Loka Kongresa Komitato profunde kaj sindediĉe laboras jam de antaŭ pli ol jaro por sukcesigi la eventon, neniam antaŭe okazintan en orienta Kanado kaj nur la duan fojon en orienta Norda Ameriko. Ĉiam indas rememori, ke lastafoje, kiam la kongreso venis al tiu mondoparto, L. L. Zamenhof mem partoprenis. Multe ŝanĝiĝis la mondo ekde la kongreso en Vaŝingtono, Usono, en 1910, sed ne tiom ŝanĝiĝis la emo de esperantistoj labori cele al pli bona vivo, al daŭra kaj signifoplena monda paco, bazita sur reciproka interkompreno internacilingva.

Enirante la trian jardekon de la dudekunua jarcento, la homaro alfrontas problemojn novajn kaj malnovajn, sed iom post iom, kunordigante strebojn pere de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj interregistaraj kaj internaciaj organizaĵoj, registaroj kaj popoloj, engaĝiĝas en la solvado de tiuj problemoj. La sukceso en tia entrepreno certe decidus ĉu la estontaj generacioj povos loĝi kaj ĝui la planedon same kiel ni faras ĝis nun. La dokumento

Celoj por Daŭripova Evoluigo, tradukita jam al Esperanto, estas bonega gvidilo, malgraŭ tio, ke la lingva problemo ne estas rekte menciita inter tiuj celoj. Nia movado, kiu deklaras sin neŭtrala rilate al sociaj kaj politikaj problemoj, ankaŭ deklaras samartikole en sia Statuto, ke “Bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj, estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.” Laŭ mia interpreto, oni ne bezonas ŝanĝi aŭ aldoni ion ajn al la Statuto por kompreni, ke la strebado al bonaj internaciaj rilatoj kaj al respektado al la homaj rajtoj pravigas sendube engaĝiĝon en la nuntempaj streboj malpliigi la elĵetadon de karbona dioksido al la atmosfero, apliki la principojn de malpliigo de uzo, de reuzado, de recikligado de materialoj kaj produktoj, ĉiuj el ili kondukantaj al malpliigoj de la homaj efikoj sur la klimaton de la planedo kaj konservado de nerenovigeblaj rimedoj al pli sana kaj pleniga vivo por la teranoj.

Kiel mi mem iam skribis sur la paĝoj de *Usona Esperantisto*: “... oni povas facile trovi rektan konekton inter la celoj de esperantistoj kaj la celoj de la movado por klimata justeco. Ni povas proponi alternativan vojon por komunikiĝo inter ĉiuj homoj, kiuj in-

teresiĝas pri vivipova estonteco por la planedo Tero. Ĉu temas nur pri “faka agado”? Ne, tiu ĉi problemo tuŝas ĉiujn fakojn kaj tavolojn de la socio. Ĉu temas pri politika aŭ sociekonomia afero? Ne. Senrigarde de via politika vidpunkto kaj de via ekonomia aŭ socia pensmaniero, vi estos same tuŝita de la aliigo de la klimato sur la planedo. Temas pri vere “neŭtrala kaj internacia fenomeno”. Oni ankaŭ povus sin demandi, kial nun, kial ni ne engaĝiĝis antaŭe? Mi povus respondi, ĉar nur lastatempe akumuliĝis sufiĉe da scienca evidenteco pri la pritraktataj problemoj, ĝi estas vera problemo de la nuntempo, kiu tute ne ekzistis aŭ estis sufiĉe malgrava en pasintaj tempoj.”

Pro ĉio ĉi, ni povas nur admire festi la iniciaton de la Loka Kongresa Komitato en Montrealo okazigi kongreson konsciante la celojn de daŭripova evoluigo, kun la emo minimumigi la median detruon kaŭzatan de vojaĝado, paperkonsumado, nutrado ktp. Ne temis pri surprizo. La urbo Montrealo estas ja pioniro inter la grandaj urboj de la mondo en tiuj ĉi agadoj. Kiam okaze de la Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en 2008 mi vizitis Montrealon la unuan fojon, la emo al konservado kaj purigo estis impresa eĉ tiam. La kongresa programo inkludis ekskurson al la recikligejo de la rubaĵo produktata de la urbo, kaj por ĉiuj



partoprenintoj tio estis atentoveka momento, kiu profundigis nian konscion pri la aferoj rilataj al media konservado kaj al kreiva solvo de vere premaj problemoj en la urbejoj de la mondo.

Por la LKK-anoj ne estis malfacile trovi apogon de la urbaj aŭtoritatoj kaj eĉ gvidadon por la sukcesa organizado de la evento laŭ la principoj de daŭripoveco. Unu el la grandaj universitatoj de la urbo disponigas al ĉiuj intereso ege detalan gvidilon pri la kon-

kretaj paŝoj entreprenendaj por minimumigi la ekologian spuron de la aranĝo. Kunlabore kun Suzanne Roy, mi sukcesis esperantigi la ĉefajn gvidliniojn; ja la nivelo de detaloj en tiu dokumento estas rimarkinda, kaj ni emis krei propran esperantlingvan materialon, uzeblan ankaŭ por estontaj renkontiĝoj. Tiu ĉi kongreso estu la pioniro rilate al nova sinteno en nia asocio kaj movado, sinteno kiu espereble disvastiĝos al niaj multaj internaciaj, landaj

kaj lokaj aranĝoj. En estonta artikolo sur tiuj ĉi paĝoj, ni detalos la diversajn novigojn enkondukotajn en la Montreala kongreso surbaze de la menciita dokumento.

Kiam vi plenigos vian aliĝilon por la kongreso, notu ke eblas ekpaŝi por mildigi la negativajn efikojn de longa aera transportado. La proponataj vojoj estos okazigi arboplantadon dum la kongresa semajno ne tro for de la kongresejo kaj ankaŭ transdoni la kolektitajn rimedojn al unu el la pluraj projektoj, kiuj tutmonde laboras por resanigo kaj malpliigo de la damaĝo al la planeda atmosfero kaj natura medio.

Fine, se vi pensas ke la problemoj de la mondo estas tro grandaj kaj ke la fortoj kaj efikoj de la esperantistoj, aŭ, eĉ malpli, de la kongresontaj esperantistoj estos tro malgrandaj, memoru la rimarkindajn agojn kaj vortojn de la sveda 16-jarulino Greta Thunberg, hodiaŭ konata tutmonde, ĉar ŝi diris: "Neniu estas tro malgranda por esti ŝanĝopova". Ni ĝoje elanu al verda kongreso en Montrealo!

Montrealo: Novstila pritrakto de la kongresa temo!

■ Humphrey Tonkin

La jaro 2020 markos la 75-an datrevenon de unu el la plej grandaj diplomatiaj atingoj de la moderna mondo – la fando de Unuiĝintaj Nacioj. Tiu tutmonda interkonsento metis la fundamenton por (laŭ la vortoj de la Ĉarto de UN) "savi estontajn generaciojn de la plago de milito", "rekonfirmi nian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj", "krei kondiĉojn necesajn por la konservo de justeco" kaj "antaŭenigi socian progreson kaj pli altan vivnivelon en pli granda libereco".

Rerigardante al tiuj 75 jaroj, oni vidas malegalan panoramon. Unuiĝintaj Nacioj almenaŭ donis lokon por

la paca solvo de internaciaj disputoj, eĉ se la nivelo de lojaleco al ĝiaj principoj variis tra la jaroj kaj de lando al lando. Militoj ja okazis, malsato kaj malsano abundis, la bazaj homaj rajtoj estis ofte neglektataj. Sed la strukturoj de UN ebligis mildigon de tiuj plagoj: UN respondis kaj respondas al naturaj kaj home kreitaj katastrofoj, nutras multloke la malsatantojn, faras sian eb- lon helpi la rifuĝintojn. Ĝi konservas antikvaĵojn, antaŭenigas sciencan, ebligas klerigon al knabinoj kaj knaboj, ordigas komunikilojn, konservas la pacan en malpacaj regionoj.

Inter ĝiaj plej brilaj atingoj estis la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj de 1948 – sed tiu estas nur unu el multaj internaciaj interkonsentoj kiuj,

eĉ se malperfekte, kreas reton de juraj garantioj kaj kondutoj.

Kiel plibonigi tiun sistemon? Kiel interpreti ĝiajn sukcesojn kaj malsukcesojn? Kiel pli efike labori por ĝiaj idealoj en epoko kiam la militpotenco kaj la minacoj al la natura ĉirkaŭaĵo povus facile nuligi la ekziston de ni kaj nia planedo?

Kaj kiel pridiskuti tion, kiam la jaro 2020 markas alian datrevenon – tiun de la plej horora elmonro de la homa kapablo, nome la 75-an datrevenon de la bomboj sur Hiroŝima kaj Nagasaki?

La temo de la Universala Kongreso en Montrealo estos ĝuste tiu datreveno de la fandiĝo de Unuiĝintaj

Nacioj, kiu formale okazis la 24-an de oktobro 1945 – dekon da semajnoj post la Hiroŝima katastrofo de la 6-a de aŭgusto.

La ĉi-supra klarigo estas alvoko al esperantistoj ĉie en la mondo veni al Montrealo por partopreni en serioza diskuto pri serioza kaj vivkonfirma ideo – la ideo de internacia kunlaboro multflanka en etoso libera, malferma kaj interkompreniĝa.

Ni kunmetis teamon de dekduo da volontuloj kiuj venos al Montrealo por klarigi pri UN kaj ĉefe por engaĝi

vin en diskutadon pri la estonteco de nia planedo en la kunteksto de Unuiĝintaj Nacioj. Mi mem gvidos tiun grupon; miaj kolegoj reprezentos ĉiujn generaciojn. La altkvalita aranĝo de la salonoj de la kongresejo faciligos la organiza-

don de formalaj kaj neformalaj grupaj diskutoj kaj interŝanĝoj de ideoj. UEA havas longan kaj signifan historion de kunlaboro kun UN – ekde la enmeto de la homaj rilatoj kiel “necesa kondiĉo” por nia laboro en nian statuton *jam en 1947*; tra la prezento de la petskribo de UEA al UN en Lake Success en 1950; tra la formala rekono

fare de Unesko en 1954 en Montevideo, konfirmita en pli firma rekono en Sofio en 1985; tra la daŭra kaj sistema reprezentado de UEA en la laboro de UN ankoraŭ hodiaŭ.

Ni festu kaj pridiskutu la pasintcon kaj estontcon de internacia ordo.

**Venu, do, al Montrealo!
Atendu ankaŭ abundon
de festado, de gajo, de rido kaj
de miro, en tiu ĉi kosmopolita kaj
vivoplena urbo.
Jes ja: Venu ankaŭ vi!**

Landa agado

Anatolij Ionesov

En Samarkando oni omaĝis al la 110-jariĝo de la Esperanto-movado en Uzbekio. Julie 2019 sojle de la Tago de Esperanto samarkandaj esperantistoj publikigis serion de grandampleksaj gazetartikoloj sub la titolo “Kulturo nomata Esperanto” kaj “Esperanto en Uzbekio: historio kaj nuntempo”. La materialojn aŭtoris la loka Esperan-

Renkonte al la Tago de Esperanto en la 2760-jara Samarkando



to-aktivulo Anatolij Ionesov kaj la sciencisto-kulturologo Prof. D-ro Vladimir Ionesov. Estas planate pretigi kaj

eldoni specialan tiuteman ilustritan broŝuron. Menciindas, ke la unua Esperantista Societo estis fondita en Taŝkento en 1909.


Se iu(j) el la legantoj de *Esperanto* disponas pri iuj ajn datumoj/fotoj/konsilaj/sugestoj ks., rilate al la historio de Esperanto en Centra Azio, bonvolu sciigi pri tio la aŭtorojn de la aperonta broŝuro: imps86@yahoo.com. La nomoj de ĉiuj kontribuintoj estos danke menciitaj en la volumeto.

Al justa lingvopolitiko en Azio / Towards Equitable Language Policy in Asia / Azia ni okeru kouseina gengoseisaku ni mukete. Aktoj de la 5-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Tokio, 2007. Red. Goro Christoph Kimura kaj Naoko Yoshida. Tokio: European Institute, Sophia University / JEI, 2008. 219p. 26cm. Trilingva: Esperanto, angla, japana. € 7,50



Al nova internacia lingva ordo / Towards a New International Language Order / Maixiang guoji yuyan xin zhixu. Aktoj de la 3-a Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Pekino, 25-26 VII 2004. Red. Lee Chong-Yeong kaj Liu Haitao. Rotterdam, UEA, 2004. 239p. 24cm. Trilingva: Esperanto, angla, ĉina. € 7,50

Al lingva demokratio / Towards Linguistic Democracy / Vers la démocratie linguistique. Aktoj de la Nitobe-Simpozio de Internaciaj Organizaĵoj, Prago, 20-23 VII 1996. Red. Mark Fettes kaj Suzanne Bolduc. Rotterdam, UEA, 1998. 212p. 24cm. Trilingva: Esperanto, angla, franca. € 7,50



Instruista trejnado en Poznano – kiel plu?

■ Katalin Kováts,
kursgvidanto, Nederlando

La kvaliton kaj estontecon de iu socio multe difinas ĝiaj eduksistemo, nivelo de instruado kaj klerigado, sekve ankaŭ la profesieco de la tiukampe agantaj pedagogoj.

Nia movado ne havas propran edukministerion, nek unuecan eduk-sistemon. La lernado de la lingvo okazas plejparte aŭtodidakte, aŭ Esperanton plej ofte instruas entuziasmoj sen lingvoinstrua diplomo, sen spertoj kaj kelkfoje sen bona lingvonivelo.


En bonaj okazoj la instruantoj iam sekvis kelktagajn fulmkursojn pri metodiko kaj akiris atestilon pri kapabloj instrui Esperanton. Tamen, plej ofte la instruantoj estas amatoroj.

Tre laŭdendas ĉies klopodo disvastigi Esperanton, akiri novajn lernantojn. Eĉ pli laŭdendas, kiam oni konscias pri la neceso de profesieco ankaŭ tiukampe, kiam individuoj investas tempon, energion kaj monon perfektigi kaj studi, kiam landaj aŭ regionaj asocioj ebligas al siaj elektitoj spertiĝi.

Ni devas konscii pri tio, ke eĉ se ekzistas bezono je tio, en malmultaj lokoj ekzistas ankaŭ la eblo je altnivela, institucia studo de Esperanto kaj ties arto instrui ĝin.

En la lastaj dudek jaroj la plej altnivela kaj kompleksa formado de

Esperanto-instruistoj okazis en la Adam Mickiewicz-Universitato en Poznano, Pollando, kie jam 7 fojojn estis lanĉitaj 3-jaraj postdiplomaj studoj pri interlingvistiko. Kadre de tiu programo, en la lasta studjaro la studentoj specialiĝas pri iu fako, unu el ili estas metodologio.



Ĝenaj vortparoj

Por ke el la programo de specialiĝo kiel eble plej multaj homoj povu profiti, jam tradicie, kun la helpo de ILEI kaj *edukado.net*, oni akceptas ankaŭ partoprenantojn por unujara formado. Ili sekvas la universitatan programon pri metodiko kaj havas eblon ĉeesti seminariojn de la universitata grupo.

Fine de septembro 2019 denove estis okazo por kunstudado. El la 10 studentoj de la Interlingvistikaj Studoj 5 elektis specialiĝi pri instruado de Esperanto kaj al ilia grupo aliĝis ĉi-foje 12 personoj el 6 landoj (Meksiko, Pollando, Italio, Francio, Germanio kaj Danio).

Tiel kun 17 personoj startis la unujara metodika kurso, konsistanta el du-

foje unusemajna intensa surloka programo, kiun kompletigas inter-sesia reta laboro.

La metodikan programon gvidis d-ino Katalin Kováts (NL), redaktoro de *edukado.net*, kaj kontribuis ankaŭ prof. d-ino Ilona Koutny (PL), gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj. Koncizan kurson pri movadhistorio prezentis Aleksander Korĵenkov (RU), krome la kurso pri nuntempa literaturo de István Ertl (LU) de la interlingvistikaj studoj estis malfermita por ĉiuj.

Kompare kun la fulmtrejnadoj, kiujn oni kutimas organizi en la movado, ekz. dum kongresoj, la unujaraj studoj vere provizas la studantojn per ampleksaj scioj. Krom la akiro de teoriaj konoj, la kursanoj travivas ankaŭ praktikajn ekzercojn kaj aktivaĵojn, por ke ili mem povu sperti, kion signifas lerni novan lingvon.



En la riĉa gamo de teorio pri lingvoinstruado oni havis superrigardon pri la instrumentadoj, psikologiaj faktoroj de la lernado, klasifiko kaj elprovado de diversaj ekzercotipoj, kompilado de instruprogramoj, instruplanoj, kaj pri instruado de leksiko. La partoprenantoj lernis pri la evoluigo de lingvokapabloj kaj ilia taksado kadre de la KER-sistemo. Grandan intereson havis la foiro de Esperanto-lerniloj. Inter plurdekoj da lerniloj la kursanoj serĉis la plej bonajn ilojn por instrui Esperanton, kaj kun akraj kritikoj ili flankenŝovis la malpli valorajn, eĉ se tiuj estis verkitaj de konataj aŭtoroj. Oni traktis ne nur la klasikajn lernolibrojn, sed okupiĝis ankaŭ pri modernaj lerniloj, kiel poŝtelefonoj kaj komputilaj programoj kaj retkursoj.



Hotelo: improvizata rolludo laŭ la situaci-komunika metodo



Neeviteblis la detala analizo de *edukado.net*, kie la instruantoj de Esperanto povas trovi riĉan helpon por sia laboro: detalan prezenton kaj specimenojn de ĉ. 600 lerniloj, 800 uzpretajn ekzercojn kun solvoj kaj klarigoj, kolekton de edukcelaj filmoj, korespondan servon, kolekton de artikoloj, forumon por spertinterŝanĝoj, ankaŭ klerigajn programojn pri diversaj temoj kaj la lernigan ludon RISKO.



Ĉar la kursanoj inter la sesioj rete daŭrigos siajn studojn en la mal-longigita versio de la Reta Instruista Trejnado ĉe *Edukado.net* (RITE), ili ne

nur ekkonis la retejon, sed ekde la komenco de la studoj fariĝos aktivaj uzantoj de la paĝaro. Iliaj plej bonaj hejmtaskoj eĉ aperos en la kolekto de *edukado.net* kaj ilin povos uzi aliaj kolegoj dise en la mondo.

La postulata lingvonivelo de la kursanoj estis minimume B2 (laŭ la KER-sistemo), sed ĉiu el ili devos atingi la nivelon C1 ĝis la fino de la studoj. Por plenumi tiun pretendon la partoprenantoj uzos la programon *Ekparolu!*, kie la spertaj (kiel „onkloj”) subtenas en la studoj la malpli spertajn, kiuj fariĝis nevoj de *Ekparolu!* Cetere, ĉar la estonteco estas lernado kaj instruado pere de la reto, al la trejnprogramo apartenas ankaŭ tiutipa spertigo.

La partoprenantoj de la programo en februaro 2020 daŭrigos siajn ĉeestajn studojn kaj ekzameniĝos en septembro 2020, prezentante modelleciojn, ekzameniĝante pri metodologio, gramatiko, kulturo kaj movad-historio. La estontaj instruistoj devas verki ankaŭ finlaboraĵon kaj antaŭ komisiono defendi ĝin. La dokumentoj de la pasintaj kursoj konsulteblas en la Dokumentujo aŭ en la sekcio “Diplomlaboraĵoj” de *edukado.net*.

Laŭ la spertoj de la pasintaj grupoj, la finintoj de la formado pli konscie ek-agas en sia regiono, ekinstruas Esperanton kun fakaj konoj, kunlaboras en internaciaj projektoj, mem komencas trejni instruistojn, verkas ekzercojn, eĉ lernilojn, kunagadas en la organizado de KER-ekzamenoj, fondas Esperanto-grupon, lingvan kafejon en sia urbo, kaj ricevas invitojn por instruado de Esperanto-centroj kaj aranĝoj.

La instruantoj de la metodika programo atentigas pri la “laborigo” de la kursfinintoj, donas al ili pliajn taskojn, atentigas pri ili asociojn kaj instancojn, kiuj povos utili la laboron de la freŝdiplomitoj.

Plurfoje okazis, ke la studentoj pli profundigis siajn sciojn en la 100-leciona reta trejnado RITE, sed okazis jam ankaŭ tio, ke el “unuĵara studento” fariĝis “tri-ĵara”, ĉar la personoj post la bonaj spertoj ekstudis en la trijara programo de la postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj de UAM.

Multe valoras ankaŭ la dumstudaj amikecoj inter la studentoj, la ebloj ekkoni aliajn kulturojn kaj morojn. La kontaktoj plu restos post la studoj kaj ebligas internaciajn kunagadojn, komunajn planojn kaj ilian realigon.

La estonteco de la profesia kaj institucia instruista trejnado kaj de la unikaj interlingvistikaj studoj dependas de la loka situacio (reformo de supera instruado en Pollando), kaj ankaŭ de Esperantio. Se vi volas profesiiĝi en instruado de Esperanto aŭ en esperantologio/interlingvistiko, ti- am jam nun pripensu la aliĝon al la ebla grupo en 2021-24 kaj instruista trejnado 2023-24.



Rememore pri Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof

■ Roman Dobrzyński

Kun la nepo de la kreinto de Esperanto mi konatiĝis en la jaro 1987 dum la 72-a Universala Kongreso de Esperanto, okazigita en Varsovio por soleni la centjaran jubileon de la lingvo internacia. Poste ni plurfoje renkontiĝis, ĉar d-ro Zaleski-Zamenhof de tempo al tempo vizitis Varsovion pro siaj profesiaj taskoj. En la jaro 1992 invitis nin eksprezidanto de la pola parlamento, Roman Malinowski, kiu –



Ludoviko Zamenhof, la Nepo,
1935, Romo

kiel honora protektanto de la jubilea kongreso – multe kontribuis al ĝia sukceso. Li akceptis nin en sia hejmo kaj montris ĵus eldonitan libron, kiu dokumentis lian rolon en eventoj de la tiama bunta periodo de politikaj transformiĝoj. Dum la nepo foliumis la libron, la dommastro instigis lin priskribi sian vivon, ĉar nur en la duobla nomo Zaleski-Zamenhof kumuliĝas tiom da travivaĵoj, ke ili sufiĉas por kelkaj biografioj. Sed la nepo de Ludoviko Zamenhof refutis tiun ĉi ideon. Li ne volis tuŝi la traŭmatojn de la milita tempo. Tamen dum nia sekva renkontiĝo en Varsovio li menciis, ke eble estus utile, se liaj vivospertoj ne restus kaŝitaj.

Aŭtune 1993 ni kunveturis al la litova kuraĉloko Druskininkai, kie li

infanaĝe kelkfoje feris kun siaj gepatroj. Estis kroma motivo; proksime situas la vilaĝo Veisiejai, kie la juna Ludoviko Zamenhof unuafoje praktikis sian kuracistan profesion kaj samtempe finpretigis la „unuan libron”. La vizito al Veisiejai sendube instigis d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof paroli pri sia biografio. Mi demandis, kion li konsideras sia plej granda vivsukceso, kaj li respondis ŝerce: *Tion, ke mi estas samtempe avo kaj nepo; la avo en mia propra familio kaj la nepo en la esperantista granda rondo familia.* La interparolo komenciĝinta en Litovio daŭris ok jarojn. Tio ne estis kutima intervjuo. Ni babilis pri diversaj temoj. Mi notis faktojn, datojn, nomojn, anekdotojn, kiuj ŝajnis al mi interesaj. Kelkfoje ni vojaĝis kune, partoprenis aranĝojn, dum kiuj d-ro Zaleski-Zamenhof parolis publike, aŭ private en amikaj rondoj. Ankaŭ tio estis por mi notinda. Surbaze de tiel kolektita materialo, riĉigita per propraj observoj kaj scio, komenciĝis la verkado de libro en la pola lingvo. Ludoviko C. Zaleski-Zamenhof, konata en Esperantujo kiel la nepo de la kreinto de la lingvo internacia, estis en si mem eminenta Zamenhofo: inĝeniero, konstruanto de artefaritaj insuloj, intelektulo, humanisto kaj samtempe ĉarma, humurplena persono. La verkado okazis peco post peco; ĉiujn partojn Zaleski-Zamenhof persone aprobis.

La bona akcepto de tiu ĉi pollingva unua biografio pri la nepo de Zamenhof tentis reverki ĝin en Esperanton. Ĝi aperis en Litovio s.t. *La Zamenhof-strato*, kaj estis lanĉita dum la Universala Kongreso de Esperanto en Gotenburgo (Svedio, 2003). La lanĉon ĉeestis la protagonisto de la verko mem. Surprize por mi oni komencis ĝin traduki el Esperanto en diversajn lingvojn. Unue ĝi aperis en la litova, poste japana, portugala, kroata, slovena, slovaka, ĉeĥa, estona, hungara, franca, itala, germana kaj hispana lingvoj. Baldaŭ aperos la ĉina versio. La spontana tradukado de *La*



Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof
(la unua de la dekstro) kun familio

Zamenhof-strato estis klarigebla per tio, ke ĝi montriĝis dokumento pri la nekonata sorto de la familio Zamenhof dum la dua mondmilito. L.C. Zaleski-Zamenhof la unuan fojon malkovris gravajn faktojn kaj korektis misinformojn, mitojn aŭ falsajn elpensojn pri tiu ĉi temo.

En la jaro 2014 Esperanto estis enskribita en la Pollandan Liston de Nemateriaj Kulturaj Heredaĵoj. Tiu ĉi senprecedenca ŝtata ago anticipis la rekomendon de Unesko celebri en la




Sur ruinaĵoj de la Zamenhof-domo,
14.04.1946



D-ro Louis Christophe Zaleski- Zamenhof

■ Birthe Lapenna

D-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof estis bonega amiko de mi kaj mia edzo, Ivo Lapenna, kiu bedaŭrinde forpasis jam la 15-an de decembro 1987 dum nia kristnaska restado ĉe mia patro, Peter Zacho, en Kopenhago.



Prof. D-ro Ivo Lapenna, “Unu el la plej famaj kaj bonaj juristoj pri Internacia Juro en la mondo”, kaj “La plej fama kaj bona juristo pri Kompara Juro, Rusa kaj Orient-eŭropa Juroj en la mondo”. – Li estis ankaŭ “La arkitekto kaj konstruinto de la moderna UEA”. – Louis estis granda admiranto de Ivo Lapenna. Mi posedas multajn leterojn de nia komuna amiko.

D-ro Louis Christophe Zaleski-Zamenhof estis ĝis nun “Protektanto de la Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna”, kies Prezidanto estas Prof. D-ro Carlo Minnaja.

Kiam mi eksciis pri la forpaso de Louis, la nepo de D-ro L. L. Zamenhof, mi tuj telefonis al lia edzino, Juliette, en Parizo, kun kiu mi estas en tre bona rilato. Mi profunde sentas kun ŝi, kun la du filinoj de Louis, Hanna Zaruski-Zamenhof kaj Margaret Zaleski-Zamenhof, kaj kun la tuta familio.

jaro 2017 la centan datrevenon de la morto de Ludoviko Zamenhof. Pro la sama okazo la pola Nacia Instituto de Kulturheredaĵoj subvenciis la pollingvan eldonon de la libro *Zamenhof en Varsovio*, kiun poste eldonis Universala Esperanto-Asocio en la lingvo internacia. Tiu ĉi libro, kiu ĉefe koncernis la kreinton de Esperanto, ankaŭ kompletigis la biografion de lia nepo. Temas pri la paroĥa domo apud la katolika preĝejo de Ĉiuj Sanktuloj, kiu troviĝis en la tereno de la geto en Varsovio. L.C. Zaleski-Zamenhof atestis la ofereman konduton de la pastro Marcelli Godlewski rilate al getanoj, kiuj vivis en terura interpremo. Li loĝigis en la konstruaĵoj de sia paroĥejo proksimume 100 personojn, interalie plurajn membrojn de la familio Zamenhof. La eldiroj de la nepo pri tiuj eventoj montriĝis la ĉefa atestaĵo, laŭ kiu Yad Vashem en Jerusalemo atribuis postmorte al la pastro Marcelli Godlewski la titolon de *Justulo inter la Popoloj pro la helpo, kiun li faris por judoj, endanĝerigante sian vivon kaj tiun de siaj proksimuloj en Pollando sub la germana okupacio dum la dua mondmilito*.

Laŭ la cititaj libroj estis kompilita la konciza biografio *Avo, kiu estas nepo* en la pola kaj Esperanta lingvoj. Ambaŭ broŝuroj estis aprobitaj de d-ro L.C. Zaleski-Zamenhof. Li ne sentis sin komforte, kiam samideanoj esprimis honorojn al li kiel la nepo de la kreinto de Esperanto, ĉar tiu ĉi fakto ne estas lia merito. Li ankaŭ miris, ke intervjuantojn interesas ĉefe lia estado en la geto. Jes, tio estis terura tempo, kiu daŭris unu jaron kaj duonon. Sed poste pasis jardekoj, dum kiuj li mem direktis sian vivon. Li ne sekvis la medicinan profesion de siaj familianoj,

sed fariĝis konstruĝeniero kaj atingis sur tiu ĉi kampo sukcesojn en monda skalo.

Kia estis la kialo de lia duobla nomo? Eskapinte el la geto aŭguste 1942, li akiris de la sekreta armeo de la okupita Pollando falsan personan dokumenton je la nomo Krzysztof Zaleski. Sub tiu ĉi fikcia identeco li senkaŝe vivis, laboris kaj tamen sekrete agis en la kontraŭgermana rezisto. Kiam finiĝis la milito, li revenis al sia originala nomo, sed ne forlasis la fikcian pseŭdonimon pro jena motivo: *Se Zaleski savis Zamenhofon, ne decidas, ke Zamenhof forturniĝu de li. Tial mi kunmetis ambaŭ nomojn kiel Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof, ĉar mi sentas min unu kaj la alia. La diferencoj en la unueco estas fundamento de la ideo de toleremo, kiun mi akceptis kiel la devizon de mia vivo*.

L.C. Zaleski-Zamenhof respektis la fakton, ke lia avo forcedis por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn je sia lingvo, kaj komprenis, ke tiu decido koncernas ankaŭ liajn heredantojn. En la jaro 1912 Ludoviko Zamenhof retiriĝis de la Esperanto-movado, kaj tiel sugestis al siaj familianoj eviti akceptadon de postenoj en ĝi. Tamen postrestis la tradicio saluti Universalajn Kongresojn de Esperanto nome de la familio Zamenhof. La nepo dum ses jardekoj, kun paŭzoj, plenumis tiun ĉi rolon. La lastan fojon li oratoris salute kiel naŭdekjarulo dum la jubilea 100-a UK en Lille (2015), kaj tie solene transdonis la tradician torĉon al siaj filinoj Hanna Zamenhof-Zaruski kaj Margaret Zaleski-Zamenhof. D-ro Ludoviko Kristoforo (Louis Christoph) Zaleski-Zamenhof forpasis la 9-an de oktobro 2019 en la aĝo de 95 jaroj, sen tri monatoj.

Freŝa vento blovas en Kroatio

■ Marija Jerković

La esperantistoj en Kroatio memoros la jaron 2019 pro kelkaj gravaj eventoj, kiuj firmigis la rolon kaj certigis la sorton de Esperanto en tiu lando. En la tiea movado blovas freŝa vento de pozitiva publika opinio kaj bona renomo de Esperanto, aparte en la nordokcidenta parto de la lando. Pri la agrableco de tiu vento povis konvinkiĝi ankaŭ la Ĝenerala Direktoro de UEA Martin Schäffer, kiu persone partoprenis la plej gravajn aranĝojn dum septembro.

La kroatia movado fakte estas relative malgranda, sed tre aktiva. Ĝiaj aktivaĵoj fariĝas ĉiam pli publikaj kaj malfermaj al neesperantistoj, kio ebligas kompreni Esperanton kiel kulturan fenomenon kaj forigi ĝiajn malnovajn agadformojn. Publikaj komunikiloj raportas pri Esperanto ĉiam pli ofte kaj preskaŭ senescepte pozitive.

En la aktivado elstaras la nordokcidenta regiono inter la urboj Bje-



lovara esperantista societo estis (re)fondita post la tre sukcesa 9-a Kongreso de Kroataj Esperantistoj en 2011, kaj Dokumenta Esperanto-Centro unu jaron pli frue. Sed temis nur pri renovigo de la laboro, ĉar la tradicio de Esperanto en ambaŭ urboj estas tre longa. Sian longegan tradicion de Esperanto Bjelovar festis septembre enkadre de la 7-a aranĝo *Esperantistoj de Bjelovar al sia urbo*, kiu estas tradicia parto de la festado de la Tago de la urbo. La temo de la ĉi-jara aranĝo estis *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*. Esperanto en Bjelovar datiĝas ekde 1909, en ĝin estis tradukita la unua verko el la kroata literaturo (la romano de August Ŝenoa *La trezoro de l' oraĵisto*, tradukita de Fran Kolar-Krom) kaj verkita la unua originala poemo (Slavko Ježić: *Se vi sciis*).

La aranĝo konsistis el pluraj programeroj. En la Urba muzeo de Bjelovar estis prezentita ekspozicio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, kiun malfermis anstataŭantino de la departementestro, s-ino Bojana Hribljan, iama lernantino de Esperanto. La ekspozicio dufoje estis filmita por la loka kaj nacia televido.

La 20-an de septembro en la kafejo kaj dolĉaĵejo *Zagorje* estis malfermita pentraĵekspozicio de Luca Cetinić, pentristino kaj esperantistino el Split, pere de s-ino Snježana Mišir, estrino de la departementa fako pri sano, socia protekto kaj emeritoj.

Sabate, la 21-an de septembro, okazis Festa kunveno, kiun partoprenis la urbestro de Bjelovar Dario Hrebak. En sia parolado s-ro Hrebak gratulis la

Bjelovaran esperantistan societon, unu el la plej malnovaj societoj en Bjelovar, okaze de la 110-a datreveno de Esperanto en la urbo. Menciindas, ke okaze de la jubileo, la Bjelovara esperantista societo ricevis la departementan premion *Plakedo Trnski* kaj la *Sigelon de Urbo Bjelovar* por sia multjara kultura agado.

En la kultura programo de la Festa kunveno partoprenis la kultur-arta societo *Golub*, cetere fondita samjare kiel Esperanto. Ilia orkestro sub la gvido de sia direktisto Goran Kukolj brile prezentis la kroatan kaj Esperantan himnojn, kiujn kantis la pianisto Vedran Milić, profesoro de la Muziklernejo *Vatroslav Lisinski* el Bjelovar. Frandaĵo de la programo de *Golub* estis ankaŭ la unua prezento de la marŝo *Esperantisto Stevo*, kiun ankoraŭ en 1952 komponis fama bjelovara komponisto, iama gvidanto de la Muzika sekcio de la Esperanto-societo, Ivan Barešić. La marŝon kun emocioj aŭskultis la filo kaj aliaj familianoj de Stjepan Maltar, bjelovara esperantisto, al kiu la komponaĵo estis dediĉita.

Sian programon prezentis ankaŭ la junaj violonistoj Lorena Radičević kaj Luka Baranašić el la Muziklernejo *Vatroslav Lisinski* kaj kantgrupo de la Elementa Lernejo *Mato Lovrak* el Veliki Grđevac.

Dum la kunsido estis atribuitaj dankdiplomoj al la Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora kaj specialaj diplomoj al tri forpasintaj kaj tri vivantaj esperantistoj, kiuj elstaris per siaj aktivaĵoj dum la tuta historio



Martin Schäffer
kun Josip Pleadin

lov, Koprivnica, Đurđevac kaj Križevci, kiuj distancas po tridekon da kilometroj unu de la alia. Ekzistas du motoroj de la tiea agado: la Bjelovara esperantista societo kaj Dokumenta Esperanto-Centro en Đurđevac. La Bje-

Fotoj de Sanja Forjan Pleskina



de Esperanto en la urbo: Fran Kolar-Krom, Dragutin Štokić, Vilim Polašek, Ivan Petreković, Franjo Forjan kaj Zdenka Polašek.

Historian projekcion en la aranĝo prezentis Josip Pleadin, kiu aŭtoris ankaŭ la ampleksan plenkoloran kroatingvan monografion *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*. La materialo por tiu monografio estis kolektata dum ok jaroj, kaj la bezonatan monon por la eldono certigis la Urbo Bjelovar kaj Departemento Bjelovar-Bilogora, kiuj estis aŭspiciantoj de la tuta aranĝo.

Post komuna fotado kaj vizito al la unua ZEO en la urbo, la Arbo de internacia amikeco, plantita en 2018 okaze de la 20-a Alp-Adria Esperanto-Konferenco, oni inaŭguris la duan ZEO-n, memortabulon al Vilim Polašek, certe la plej fama kaj plej longe aktiva esperantisto en Bjelovar. La tabulo pendas sur la fronta muro de la domo, en kiu li vivis, kaj ĝin inaŭguris Tea Macan, la nepino de Vilim Polašek, kaj Martin Schäffer, Ĝenerala Direktoro de UEA.

La posttagmeza programo okazis en la Hotelo *Central*. Krom solena tagmanĝo, tie okazis la 7-a Deklamkonkurso, kiun partoprenis rekorda nombro da deklamantoj, eĉ 25! Oni deklamis en tri kategorioj (elementlernejanoj, mezlernejanoj kaj studentoj, plenkreskuloj), kaj estis ankaŭ kelkaj eksterkategoriaj recitantoj. La plej sukcesaj en ĉiuj kategorioj ricevis medalon kaj libropremion, kaj la plej bona deklamanto en ĉiuj kategorioj, la gimnazianino Magdalena Mesarov el Ďurđevac, ricevis specialan pokalon.

Dimanĉe, la 22-an de septembro, la partoprenantoj per speciala buso kaj pluraj aŭtomobiloj veturis ekskurse al Ďurđevac. Ili vizitis la fortikaĵon *Malnova urbo*, la tiean galerion kaj la aktualan ekspozicion de la hispana pentristo Salvador Dalí. La ĉefa programero de la ekskurso tamen estis la inaŭguro de la nova domo de Dokumenta Esperanto-Centro, kiun oni komencis konstrui en septembro 2017. Por la konstruado kontribuis pluraj Esperantaj institucioj kaj esperantistoj el kel-

kaj landoj. Al tiuj oferemaj donacintoj oni dankis per speciala memortabulo, malkovrita de Josip Pleadin kaj Martin Schäffer. Starante antaŭ la nova domo, la prezidanto de DEC Zdravko Seleš diris, ke oni ne staras antaŭ la domo, sed antaŭ realiĝinta sonĝo de Josip Pleadin, kiu iniciatis kaj gvidis ĝian konstruadon.

Dokumenta Esperanto-Centro estas nacia Esperanto-arkivo de kroataj esperantistoj, al kiu pluraj vizitantoj ankaŭ tiudimanĉe donacis valorajn materialojn. La plej valoraj donacoj venis de la Esperanto-muzeo en la ĉefha urbo Svitavy, kies reprezentantoj alpor-

Urbestro Dario Hrebak transprenis dankdiplomon



tis kvar skatolojn da libroj kaj gazetoj, ĝis nun mankintaj en DEC, kaj la donaco de pluraj celuloidaj filmoj, kiujn al DEC transdonis László Szilvási el Budapeŝto. Sed DEC estas ankaŭ grava Esperanto-eldonisto kaj organizanto de aranĝoj landvaste. La malfermo de ĝia nova domo estas epokfara evento, ĉar DEC estas la ĉefa portanto de „la tradicio de Esperanto en Kroatio“, kiu en februaro 2019 ricevis statuson de nemateria kultura havaĵo, kaj estas notita en la respektiva registro sub la numero Z-7298.

Lunde, la 23-an de septembro, en la Popola biblioteko *Petar Preradović* en Bjelovar okazis solena prezento de la jam menciita monografio *110 jaroj de Esperanto en Bjelovar*, verkita de Josip Pleadin, sendiskute unu el la ĉefaj figuroj de la nuntempa kroata Esperanto-movado, cetere sekretario de DEC. La monografion prezentis Mihaela Cik, kaj la programon gvidis Tina Gatalica.

Se resumi la tuton, la jaro 2019 estas escepte sukcesa por kroataj esperantistoj. La monda esperantistaro prave atendas pliajn sukcesojn.



Ekskurso al Ďurđevac



Esperanto dum POL'and'ROCK

Halina Komar,
Kazimierz Krzyżak

Transformado de Laborteamo por Multkultura Vilaĝo Esperanto dum POL'and'ROCK – atendado de novaj aktivuloj, freŝaj ideoj, novaj monfontoj...

Organizita jam la 25-an fojon la grandega Festivalo Woodstock/Pol'and'Rock jam estas post ni! Neimagebla amaso da publiko (ĉirkaŭ 800 000 ĉeestantoj kaj dum la grandaj koncertoj – ĝis unu miliono!), kvankam pro malbona pluva vetero dum 2 antaŭaj tagoj, la vivo de la tuta Festivalego iomete malfruiĝis. La plej granda ondo de ĉeestantoj venis tien jam dum suneto la 1-an de aŭgusto 2019.

Kiel ĉiam, pri la fizikaj/teknikaj kondiĉoj ĉe la estiĝo de Multkultura Vilaĝo Esperanto, zorgis la amikoj el Vroclavo: Michał Sidorowicz kaj Pat-

ryk Zadka. La rolo de la Centro de Interkultura Edukado Nowy Sącz (CEM), Wrocław, estis batali (forte!) por kolekti la necesan monon tiu-cele kaj organizi la ĝustan Laborteamon, prepari la necesan stokon de informiloj, flugfolioj kaj la lastaj broŝuroj... Atentigo: la lastan fojon ni povis eluzi la restantajn post nia 3-jara informado/varbado informajn materialojn, kun la broŝuro plej interesa por la publiko *Odkryj Esperanto-Fascynujący język* pollingve.

Tial por la venonta jaro, krom la kostoj de instalado kaj poste laborplena restado tie – oni devas antaŭvidi ankaŭ eldonkostojn de informaj materialoj, entute elĉerpitaj...

Ni memoru, ke la plej granda grupo de gejunuloj (ĉ. 500 000) venas el Pollando, ili ne konas Esperanton, do ni devas jam vintre prilabori kaj presi multajn informilojn en la pola lingvo. Certe ni devas prepari kaj disdoni al miloj da partoprenantoj la flugfoliojn pri aplikeblo meti en poŝtelefonon la kurtan kurson gvidatan de Stano Marček dum la Festivalo.

En 2019 la Multkultura Vilaĝo Esperanto situis rekte antaŭ la ĉefa enirejo de la sidejo de la Festivalaj Organizantoj – ASP (Akademio de Belegaj Artoj). Por rezervi tian prestiĝan lokon, la kolegoj el Vroclavo venis tien jam 2 tagojn pli frue. Bedaŭrinde pluvis, la festivaleja spaco malrapide pleniĝis, kaj fakte la plej granda ondo de ĉeestantoj atingis la lokon jam kun grupo el CEM Nowy Sącz, la 31-an de julio. Kaj ni estis plene mirigitaj pro la tieaj faktoj:

- la Vilaĝo troviĝis en la plej bona loko sur la tereno de ASP,

- ĝi estis jam preparita por inviti la festivalan junularon, bone meblita kun aparataro,

- atendis nin bone ekipita kuirejo kun glaciŝranko, toastrako, fritilo/rostilo, servilo de akvo...

- specialan, apartan tendon vroc-lavanoj preparis por ni kiel dormejon.

Mankis tie nur akustika aparataro por prelegantoj kaj granda banderolo kun ŝildo de nia Vilaĝo, sed tion ni kunportis el Nowy Sącz!

Do, ĉi-jare ni sentis nin en nia tendumejo preskaŭ hejmece, povante gastigi en la Vilaĝo multe pli da interesatoj pri nia edukado kaj informaj servoj – gasteme, kore, sincere...

Kiom bonaj, valoraj estis/estas la junuloj el Vroclavo, se ili mem ĉion tiel bone aranĝis, transportis, preparis por niaj komunaj uzo kaj ĝuo... Kaj plej multe oni organizis tion preskaŭ senmone, luante la necesajojn per konatoj/familianoj/kolegoj ks.

En la Vilaĝo atendis nin Stano Marček kun Suzana Kornicka, kiu havis planitan koncerton en la urbo Kostrzyn ĉe Oder.

Karaj Geamikoj, kiel estas skribite en la titolo de la artikolo, la movadaj decidantoj pri la sorto kaj prospero de Esperanto devas teni kaj flegi la projekton pri Granda Ideumado.

Tio eblas tiom grandskale nur dum la POL'and'ROCK-Festivalo. Nenie eblas agi en tiom amasa junulara publiko, entuziasma kaj engaĝiĝema, kun kari-





Ekde 2017 Universala Esperanto-Asocio subtenas, alvokas la mondonacojn kaj helpas financi la projekton de *Multkultura Vilaĝo Esperanto*.

Mondonacojn bonvolu sendi al la Fondaĵo Konsciigo de UEA, kun komento «Polandrock»

<https://uea.org/alighoj/donacoj>
Vidu aldonajn fotojn kaj raportojn ĉe: <http://www.gazetaro.org/polandrock>

tataj emoj/konoj/scioj... Bonvolu ne perdi la ŝancon; ĉiuj scias, ke ni batalis pri la loko tie pli ol 8 jarojn, kaj atingis tion danke al Kazimiro Krzyżak, hodiaŭ jam 90-jara.

La Estraro de UEA devus donaci iom da atento al la afero, kie pro la troa aĝo kaj malsano devis jam rezigni pri taskoj Kazimiro kaj Halina Komar.

por labori tie surloke. La permeso de la Festivalaj Organizantoj estis direktita al nia Organizaĵo, CEM. Tial, dum niaj kapoj ankoraŭ laboros, ni povos gvidi la oficistaran parton de la evento, sed pli bone estus, ke estu preparata jam alia solvo.

Ni havas la taskon montri al vi la nunan situacion de la Laborteamo ĉe POL'and'ROCK:

La grupon ni kreis el esperantistoj en Nowy Sącz, Varsovio kaj Vroclavo: la „ŝlosilojn” ni disponigas por Ata (Małgorzata Kaczanowska), kiu fariĝos anstataŭ Halina Komar la „vilaĝa dommastrino”. Aliaj homoj por gvidi la programon: Esperanto-kursoj – Stano Marček, diverstemaj prelegoj Kamil Dudkowski, servado kaj informado ĉe standoj Lidia Komar, Patrycja Barwińska, Eliza Gładys, Suzana Kornicka, Ata (ankaŭ *Five o'clock*). Krom esperantistoj estas kun ni ĉ. 4 amatoraj artistoj, ni traktas ilin kiel AdE (Amikojn de Esperanto) kun la espero, ke ĝis la somero ili ankaŭ iom lernos Esperanton. Ili faras ĉion necesan en la Vilaĝo, aranĝas artajn renkontojn kun konataj ensembloj...

El Varsovio ni havas la tre entuziasmajn kaj laboremajn Kamil Getka

kaj Maria Sułkowska. Ili ankaŭ faras ĉion – deĵoras, fotas, informas, aĉetadas, ordigas...

Pri knaboj el Vroclavo ni jam skribis pli frue – sen ili ankaŭ la Vilaĝo ne povus ekzisti...

Tiamaniere ni montris teamon de tre valoraj homoj, kiuj pretas plu labori por la Multkultura Vilaĝo Esperanto.

La nuna, nova Prezidanto de UEA Duncan Charters partoprenis la Festivalon la unuan jaron en festivala tendo en 2016 kun sia edzino Cecile. Ni estis tie la unuan fojon, do ne havis spertojn pri aranĝado de festivalaj eventoj.

Nune la Teamo estas jam forta, sed mankas vera gvidanto de la Projekto. Ni kredas, ke „movadanaj decidantoj” trovos la ĝustan homon, al kiu ni povos transdoni nian ĝisnunan „mentoran protekton” por la Projekto...

Ni, komencintoj de la *Granda Ideumado* pri/por Esperanto en unu el la plej grandaj Festivaloj en Eŭropo, informas, ke venis jam la tempo por transdoni la stafetkuradon al pli junaj agantoj – prenu la bastoneton kaj kuru antaŭen, kuru ĝis la fina venko...

Ni helpas laŭ niaj ebloj kaj fortoj, de surloke. Prosperon!

Foto de Andrzej Sochacki



Oni devas pensi, kiu prenos iliajn taskojn? Ni eventuale povas serĉi la facilajn projektojn pri malgrandaj mondonacoj, kiuj povus helpi la vivtenon de la Vilaĝo. Sed ni jam ne havas la forton

Foto de Andrzej Sochacki



Instituto Zamenhof: eko de la lernojaro 2019–2020

■ Dzifa Gbeglo

En Togolando, la lernojaro 2019–2020 ekis la 16-an de septembro. Kiam tiu dato estis anoncita publike al ĉiuj, tio ne tuj konvinkis. Ŝajnis al la plimulto, ke plu okazos, kiel kutime en antaŭaj lernojaroj, prokrasto de tiu dato. Tio finfine ne okazis kaj la eko de la lernojaro efektiviĝis ĝustatempe ĝenerale en Togolando, kaj aparte en Instituto Zamenhof.

Dum tiu tago ĉio okazis kiel eble plej bone. Kelkajn minutojn post la sesa matene, oni povis jam vidi en diversaj stratoj de nia urbo multajn gelernantojn, irantajn al siaj lernejoj – marŝantaj, babilantaj, ludantaj, tre belajn en siaj novaj vestaĵoj.



En Instituto Zamenhof, ĉio okazis kiel kutime. Antaŭ la unua sonorilalvoko centoj da gelernantoj plenis la korton de la lernejo kaj ĝian enirejon. Ĉiuj belaj en siaj verdaj kaj blankaj vestaĵoj, ĉiuj spertis la fieron de retroviĝoj laŭ ĝojigaj konversacioj. La spektaklo estis tiel bela, ke oni povis pensi ke ĝi plibeligis la lernejon, kies kolorojn oni revivigis por la nova lernojaro.

La unua sonorilalvoko kunigis unuatempe ĉiujn mezgradajn gelernantojn sur la lerneja korto kaj la dua klare indikis ke estas tempo por ke ĉiuj gelernantoj kune kantu la togolandan nacian himnon. Duatempe la

pedagogia direktoro de la mezgrada nivelo salutis, bonvenigis la gelernantojn kaj prezentis al ili la internajn reglamentojn de la instituto. Tridek minutojn poste, la gelernantoj de la elementa nivelo plenumis la saman ceremonion kiel iliaj gefratoj mezgradaj. Ĉiuj geinstruistoj kaj geestraranoj de la instituto ĉeestis ĉion, gajaj kaj afablaj. Kiom da gelernantoj entute kaj en kiom da klasoj?

Estas du niveloj en Instituto Zamenhof. La unua (baza aŭ elementa) nivelo, kaj la dua (mezgrada aŭ kolia). Plie ekzistas ankaŭ klaso por infanoj, kiuj estas malpli-ol-5-jaraj. En la elementa nivelo estas ses klasoj, kio signifas, ke tie oni studas ses jarojn, antaŭ ol trapasi la ŝtatan ekzamenon por eniri lernejon mezgradan. En tiaj ĉi oni studas kvar jarojn antaŭ ol trapasi ekzamenon por eniri triagradan lernejon aŭ liceon.

En la klaso por infanoj estas 35 gelernantoj. La unua klaso de la unua nivelo havas 38 gelernantojn, la dua klaso – 39, la tria – 40, la kvara – 41, la kvina – 40 kaj la sesa – 38. Rimarkindas, ke estas pli da gelernantoj en la mezgrada nivelo.

En la unua klaso de la meza nivelo estas 67 gelernantoj, dum en la dua klaso – 56. En la tria klaso troviĝas 63 gelernantoj kaj la kvara klaso havas 57.

Dum tiu unua tago de la lernojaro 2019–2020 neniuj ripozemis. Ĉiuj rekte komencis serioze la diversajn laborojn. Kaj ĉiuj tagoj de la unua semajno de la jaro estis kiel la unua. Kaj ankaŭ Esperanto estas instruata.

Laŭ la programo de Instituto Zamenhof, ĉiuj gelernantoj de la lernejo devas lerni Esperanton. Tamen ne ĉiuj lernas, kaj ne ĉiuj lernas samtempe. Jam ekde la unua tago de la lernojaro 2019–2020 Esperanton eklernis la gelernantoj de la unua, dua kaj tria klasoj de la mezgrada nivelo. En junio/julio estis aparta kurso de Esperanto por gelernantoj de la kvina kaj sesa klasoj de la elementa nivelo kaj ankaŭ de la



kvara klaso de la mezgrada nivelo. La instruistoj estas s-roj Doumegnon Koffi kaj Gbeglo Dzifa. Necesis raportoj al la gepatroj de la gelernantoj kiel komenciĝis la laboroj en Instituto Zamenhof. Tiucela kunveno okazis.

La tagmezon de sabato, la 21-a de septembro 2019, kuniĝis la gepatroj de la gelernantoj de la instituto, ĝiaj laborantaro kaj estraro. Temis pri la unua kunsido de la jaro kun la gepatroj de la gelernantoj de la Instituto. Dum tiu kunsido, la laborantaro de la nuna lernojaro estis prezentita al la gepatroj, la direktoroj de ambaŭ niveloj prezentis raportojn pri la laboroj de la antaŭa lernojaro, novaj planoj estis prezentitaj, nova estraro de la asocio de la gepatroj de la gelernantoj de Instituto Zamenhof estis elektita, kaj multaj aferoj koncerne la bonan funkciadon de la lernejo diverse estis priparolitaj. Kaj oni ne forgesis, ke Instituto Zamenhof malfermiĝis la 13-an de septembro 2004. Do dum oni daŭrigas kviete la diversajn pedagogiajn kaj administrajn laborojn en adekvata kaj trankvila etoso, oni senpacience atendas la celebradon de la dekkvina datreveno de la kreo de nia kara Instituto Zamenhof. Ĉar tio ne povis okazi la 13-an de septembro 2019, alia dato estis proponita.



La 27-an de septembro 2019 komenciĝis la celebrado de la 15-jariĝo de Instituto Zamenhof. Tiam la gelernantoj de la instituto faris diversajn ludojn, kantis kaj dancis. Kiuj bone ludis, tiuj ricevis diversajn premiojn. Notindas, ke ĉiuj gelernantoj kaj geinstruistoj de la instituto povis tiam ion frandi. Ĉirkaŭ la 19-a horo finiĝis tiu unua tago de la festo, kiu daŭris la postan tagon.

La 28-an de septembro 2019, jam je la 7-a horo okazis matĉo de ĉukbalo (Tchoukball) inter la teamo de la gelernantoj de Instituto Zamenhof kaj tiu de la geinstruistoj. La gepatroj de la gelernantoj spektis la ludon, preskaŭ nekonatan en nia lando. Kaj la festado pluiris.

Gepatroj, gelernantoj, geinstruistoj kaj vendistinoj de Instituto Zamenhof alvenis al la lernejo, kiu per Esperanta muziko bonvenigis ilin. Anonciĝis la programo de la tago. La



gvidantaro de Instituto Zamenhof prezentis diversajn manĝojn kaj trinkaĵojn al la ĉeestantoj. Ĉiuj tiom satis, ke ili ne povis frue forlasi la lernejojn. Parolado de la administranto de Instituto Zamenhof, s-ro Gbeglo Koffi, okazis. Sekvis poste tiuj de la prezidanto de la asocio de la gepatroj de la gelernantoj. Ankaŭ reprezentantoj de nutraĵ-vendistinoj kaj de la geinstruistoj pa-

rolis. La plej impona parto de la programo estis la historio pri la ekzisto de Instituto Zamenhof. Vere emociplena momento pro mencio pri la forpaso de Hans Bakker kaj Nelly Holevitch, kiuj laboris kun Gbeglo Koffi kaj Ans Bakker, por ke la lernejo nun ekzistu. Jes! Ĝi pluekzistu por ke togolandanoj lernu legi kaj skribi kaj ankaŭ estu esperantistoj.

UEA

Almenaŭ 750 NRO-oj en Ĝenevo

■ Mireille Grosjean

Esploro de la ĝeneva universitato pri la NRO-oj (NeRegistaraj Organizoj) kun sidejo/oficejo en Ĝenevo, Svislando, konfirmas la gravecon de la civila socio en la urbo Ĝenevo, kie situas la plej grava eŭropa sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. Kiam iu kreas NRO-on, ne estas en Svislando deviga paŝo anonci tion al la komerca registro. La Svisa Konfederacio, la Kantono de Ĝenevo kaj la urbo mem donis al la universitato mandaton fari tiun esploron kun la celo fari liston de tiuj establoj. La intenco estas fari mapon de ili en konsiderado de la celoj de daŭripova evoluo deciditaj de UN en la Agendo 2030 por daŭripova evoluo. La NRO-oj situantaj en Ĝenevo dungs 3146 salajritajn kunlaborantojn, kiuj egalas 2543 plentempajn postenojn. Laŭ la Svisa Novajagentejo menciita en «ARC INFO», la tridekan de aŭgusto 2019.

Komento: NRO kiel UEA ne havas oficejon en Ĝenevo. La kvin delegitoj de UEA laboras sen salajro hejme kaj aperas en UN dum la kunsidoj.



Florian Jeanneret, lernanto de Mireille Grosjean, okaze de klasa vizito al UN en Ĝenevo la 24-an de aprilo 2008

Pro tio ĝi ne aperas en tiu statistiko. El tio ni povas dedukti, ke la nombro de NRO-oj ligitaj al UN en Ĝenevo estas multe pli alta.

Laŭ la retpaĝo de la svisa misio ĉe UN en Ĝenevo troviĝas en Ĝenevo ĉirkaŭ 750 NRO-oj, ĉirkaŭ 34000 internaciaj oficistoj, diplomatoj kaj repre-

zentantoj de la civila socio (NRO-aj kunlaborantoj), okazas proksimume 4400 vizitoj de ŝtatestroj kaj ministroj, kaj 3200 kunvenoj jare. Notindas laŭ diroj de UN-ĉiĉerono aŭditaj dum vizito, ke en Ĝenevo okazas duoble pli da kunsidoj ol en Novjorko, en la ĉefa sidejo de UN.

Nova vento venis en Koreion!

■ Inhye Gim (Ella)

Kun la temo “Kion ni faru okaze de la 100-jara jubileo de Korea Esperanto-Asocio” la 51-a Korea Kongreso de Esperanto okazis de la 5-a ĝis la 6-a de oktobro en Jinju, kiu situas en la plej suda parto de Koreio, apud Busan, en kiu pli ol 130 verdaj samideanoj partoprenis inkluzive 12 el Japanio, 4 el Ĉinio, 1 el Belgio, 1 el Brazilo, 1 el Hispanio, 1 el Mongolio.

Nur 2-jaraĝa la filio Gyeongnam prenis sur siajn ŝultrojn okazigi la Korea Kongreson de Esperanto en sia urbo.

Tion ni aplaŭdas kaj tio donas al ni kuraĝon kaj freŝan venton, nur tial ke nove naskiĝinta filio havas sufiĉan energion kaj donas ĝin al ni, KEA, kaj ili daŭre naskas novajn komencantojn. Plie en la ĉi-foja kongreso ni nepre devis elekti novan prezidanton de KEA, kaj ni elektas lin, kies nomo estas So Jinsu, kiu nun brile agadas en la Estraro de UEA. Ni esperas, ke la nova prezidanto bone gvidos nian novan 100-an jaron.

De unu semajno antaŭ Korea Kongreso al kelkaj urboj svarme venis alilandanoj kaj bruis pro nia ĝojinda renkontiĝo. Kiam esperantistoj venas al ni, tiam el ilia buŝo nur unu vorto “saluton!” elfluas, apenaŭ ni aŭdas tian vorton, ni jam amikiĝas kune harmonie kaj sentas nin kiel fratojn kaj fratinojn el diversaj landoj.

Por la antaŭkongresa ekskurso ni iris al unu granda kastelo Jinju, pri kiu



en malnova tempo Koreio kaj Japanio militis kaj unu rakonto estis pri iu virino, kiu havis la taskon ĉiunokte ĝojigi multajn virojn kaj kies nomo estis Nongae. Unu nokton ŝi intence allogis unu japanan generalon kaj ŝi brakumante lin kun dek ringoj surfingre fagligis sin kune kun li en la profundan riveron Namgang por sia patrujo!

Kaj poste ni alvenis al elementa lernejo, kies nomo estas Baeyoung. Ĝi estis nia Kongresejo. De kiam ni envenis en la elementan lernejon, mi sentis revenon al nia juneco kiel lernantoj. Ni plejparte jam aliĝis kaj tial nur la aliĝnumeron komuniki estis nia okupo. Brakumante, salutante unu post la alia, ni vidis, ke ĉi tiu kongreso konsistas el diversaj buntaj konversacioj kun alilandanoj, ekzemple Tabuchi el Japanio, Ben el Belgio, Atena kaj Nema el Koreio.

De tie mi iris al kurso por komencantoj por renkontiĝi vizaĝe-al-vizaĝe. En la komenco de la kurso la gvidanto Nema, nomante po unu homon, salutas unu al alia kun gaja humoro. Dank’ al tio, ke kelkaj japanaj komencantoj partoprenis, ni ĉiuj prenis kurson tute en Esperanto pri koncepto, formo, rolo, beligo, en kiu iuj komprenis per bildoj kaj aliaj komprenis per lia facila Esperanto. Precipe li fojfoje komparis kun aliaj lingvoj ekzemple, la franca, germana, japana kaj korea. Tio rimarkigis nin, kiom facila Esperanto estas!

En la malferma soleno nia himno kortuŝis nin. Kaj ni bone vidis, kiom da filioj estas en Koreio kaj la iliaj saluto kaj agado pri Esperanto estas nur en Esperanto. Ni daŭre aplaŭdis al ilia agado kaj al la premiitoj de Hajpin kaj Lee Chongyeong ktp. Precipe la premio Lee





Chongyeong estas signifoplena nur pro tio, ke donas ĝin gvidanto, kiu plej multe instruas Esperanton al komen-cantoj kaj gvidas ilin aliĝi al KEA.

Poste okazis bongusta vesper-manĝo, kaj post la vespermanĝo ni ĝuis Gajan vesperon kaj Lanternan festivalon. Ekster la Korea Kongreso de Esperanto, grandega kvanto da homoj venas al Jinju por vidi diversajn lanternojn de la lando. Vidante lanternojn, trinkante kafon kaj bieron, ni interbabilis pri Esperanto por Esperanto. Tiel nia nokto profundigis.

En seminario kun la temo “Labortaskoj por la centjara jubileo de KEA” ni aktive parolis pri niaj vidpunktoj por nia temo en Esperanto. Memorindas, ke Unika kiel ILEI- kaj TEJO-estrarano proponas al ni, ke la vigleco en Koreio disvastiĝu al ekster Koreio!

Post kiam finiĝis la seminario kun tiu temo, mi ekpripensis kion mi povus fari por nia venonta jaro okaze de la 100-jara jubileo de Korea Esperanto-Asocio kiel unu el la membroj de KEA.

Unue, eksciinte la fakton, ke KEA, Korea Esperanto-Asocio fondiĝis la 31-an de julio 1920, mi tre miras kaj fieras pri tio! Mia amata lingvo Esperanto! Tiom frue envenis nian landon!

Due, mi volus havi la promeson aliĝi al duobliĝo per subskribo, kiel nia Zamenhof jam faris en 1891. Tio estas ke ĝis la venonta Korea Kongreso de Esperanto ni koreoj faros duobligon tiamaniere, kaj ni serĉu novajn amikojn kaj kreskigu ilin ĝis ili sendepende staru sur la tero precize ĝis ili atingos la bazan nivelon en KEA aŭ B1-nivelon de KER. Kompreneble, ke ni gvidantoj de KEA helpu ilin per ĉiuj rimedoj de ILEI-Koreio.

Trie, mi volus sciigi nian novaĵon al alilandanoj per diversaj komunikoj.

Kiam venis la ferma ceremonio de KEA, de la prezidanto mi ricevis KER-atestilojn. Post la ceremonio ni, nome de ILEI-Koreio, havis la okazon premii ĉi-jare la KER- sukcesintojn laŭnivele. Kun granda plezuro ni transdonis la KER-atestilojn. Dum la ceremonio kelkaj homoj jam promesis aliĝi venontjare al KER-ekzameno.

Ni sekve vidas, ke dum la UK en 2017 kaj lastjare en la Namgang-lernejo, ni, koreoj, kolektis forton unuanime kaj la serio de kelkaj projektoj prepariĝas por nia 100-jara jubileo. Ekzemple, eldoni poŝtkarton en Esperanta versio,



inviti esperantistojn el Norda Koreio, fari memlernilon, kiel Duolingo en azia lingvo ktp. Mi esperas, ke en 2020 pli multe da koreoj konos Esperanton kaj disvastigos ĝin de angulo al angulo en Koreio.

Mi revas pri la venonta nova 100-a jaro!

Ekspozicio “Leteroj de la mondo”

■ Iván Mättig

Okaze de la “Internacia semajno de la letero”, lanĉita de Universala Poŝta Unio (UPU), mi faris ekspozicion, kiu nomiĝas “Leteroj de la mondo” en la Kultura Centro de Quilicura, Santiago, Ĉilio.

Ĝi okazis de la 30-a de septembro ĝis la 5-a de oktobro 2019. Ĝi temis pri la prezentado de mia kolekto de korespondkovertoj, poŝtkartoj kaj aerogramoj el 93 landoj de la 5 kontinentoj, kiujn mi ricevis de esperantistoj, entute 250 specoj. La kolekto prezentas kuriozaĵojn, ekzemple, pri landoj kiuj jam ne ekzistas kun tiaj nomoj, kiel ekzemple Zairio, kiu nun nomiĝas Demokratia Respubliko Kongo, Soveta Unio, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio. La ekspozicion vizitis pli-malpli 200 personoj.

La plimulto el ili neniam aŭdis la vorton “Esperanto”. Dum la inaŭguro, la Direktoro de la Kultura Centro, Sergio Monge, diris: “Ĉi tiu Ekspozicio pretendas valorigi informon de komunikado pere de leteroj, kiel ankaŭ pere de Esperanto kiel internacia, neŭtrala, helpa lingvo”. Li aldonis: “Ĉi tiu kolekto komenciĝis, kiam s-ro Mättig ricevis en 1968 leteron de Rudolf Seifert el Dresden, Germana Demokratia Respubliko, lando kiu post la falo de la Berlina Muro ŝanĝis sian nomon. Nun, simple ĝi nomiĝas “Germanio””.

Dum la inaŭguro, mi legis salutleterojn kiuj alvenis el Curicó de Héctor Campos, Prezidanto de Ĉilia Esperanto-Asocio (www.esperanto.cl), de la geedzoj Grattapaglia el Brazilo kaj de Renato Corsetti el Italio.



Tiu ĉi evento estas la tria kiun mi faris samloke. Nur la diferenco estas ke antaŭe ĝi nomiĝis “Ekspozicio Esperanto-Filatelito”.

Mi dankis al la Direktoro, al miaj kunlaborantoj Augusto Gaimer kaj al la juna kaj simpatia fotografistino Maite Carmona, kiuj okupiĝis pri ĉiuj detaloj, ekzemple, la diskonigo pere de belaspekta afiŝo.

Mia kolekto de kovertoj kaj Esperanto-filatelajoj estas unika en Ĉilio.

*En la oficialaj dokumentoj estas uzata ankaŭ la nomo *Federacia Respubliko Germanio* (red.)

Negrande sed promesplene

Stefan MacGill

Agrablajn surprizojn malkovris la kunveno de rumanaĵ esperantistoj – kvankam modesta kun apenaŭ dudek kvin partoprenantoj, la spuroj de espero montriĝas por tiuj, kiuj volas konstati ilin. Tion atestas interalie en la konkludaj rekomendoj de la 59-a AMO-seminario, kiu realiĝis ene de la programo. Pozitivaj signoj el la lando – la preteco agi ekster la verda kurteno por rilati kun nemovadaj instancoj, aperigi informojn pri la lingvo kaj komunumo, altiri pli junajn membrojn kaj agadi en lernejoj kaj universitatoj.

La aranĝon akceptis la Okcidenta Universitato de Timișoara kun loĝigo en apuda kolegio. Apoge al la ampleksa prelegaro okazis riĉa arta programo –



la eneventa parto de tio estis plene realigita de junulara teamo per granda vervo – teatraĵeto, muziko, deklamoj – vario kun entuziasmo. Muziko ludis grandan rolon tra la tuto, kun vespera partopreno en la urba filharmonia koncerto, kies altpinto estis tondra plenumo de la verko de Mussorgskij: ‘La grandioza pordego de Kijivo’ kaj sek-

vanokte partopreno en impona fajro-festivalo sur urba placo.

Aperis pri la evento du retejaj komunikoj el urbaj retgazetoj:

<https://tinyurl.com/y68n5wah>

<https://tinyurl.com/yy6lgsys>

Anoncita dum la aranĝo: nova rumana ŝlosilo aperis unu tagon antaŭ la kunveno. Ege konvena varbilo por novuloj, kun kolora plastumita kovrilo. La plej lasta rumana ŝlosilo aperis en 1921. Ĝi havas la kutimajn erojn: enkondukon, gramatikan resumon, vortaron (tiun de 1921 kun arkaikismoj forigitaj), laste rakonteto Kiel mi fariĝis esperantisto de Heinrich Fischer-Galati, la unua tradukinto kaj eldoninto de tiu rumana ŝlosilo en 1921. La komunemo estas organizi la sekvan kunsidon en 2020 en nova urbo, por vastigi la atingon de la landa asocio EAR.

Baza Esperanta radikaro. Wouter F. Pilger.

Ĉirkaŭ 2 950 radikoj klarigitaj per oftaj kaj kutimaj vortoj.

UEA, Rotterdam, 2010 (2-a reviziita eld.). 7,50 €, triona rabato ekde 3 ekz.



Lingvo

Nia alfabeto

Rob Moerbeek

Foje perdiĝas bona ideo, kiu meritas reenkondukon:

La alfabetvortoj Asfalto, Barbaro, Cemento.... (*Praktika Bildvortaro*) nur en unu loko diferencas de aktuale prezentataj vortovicoj: Nun “oktobro”, siatempe “omnibuso”.

Sed PAG prezentis pliajn variojn por a bo co: la plej konvena ŝajnas al mi tiu, kiu restigas la -o finaĵon ĉe la senvoĉaj konsonantoj plus la du duonvokaloj (13), sed la voĉajn plus n kaj r provizas per a (10); do utilas parkerigi

la dek: *ba da ga ĝa, ha; ĵa, na ra va za*. Nur *n* kaj *r* ŝajnas arbitraj, sed ili troviĝas en la akcenta silabo de Esperanto! Tiel ankaŭ *ŭo* diferencas de *va* kaj post *ĥo* (preter *i*) *jo* antaŭas *ko lo mo*. PAG, p. 25, sciigas ke d-ro Sirk ĝin sukcese aplikis en ISU-prelegoj (Internaciaj Someraj Universitatoj).

Krom la supersignitaj literoj frapas la manko de 4 latinaj literoj: la *kuo*, *vavo* (duobla aŭ ĝermana vo), la *ikso* kaj *ipsilono* (Q q, W w, X x kaj Y y). Tial en jardatoj, ĉapitroj indikoj kaj Esperantaj nomoj ni uzu la arabajn ciferojn, ne “en la XVII-a jarcento Ludoviko la XIV-a”,

sed “En la 17-a jarcento Ludoviko la 14-a”, kaj simile.

Cetere ni bone distingu i.a. la paroĵn *a e, e i, o u, c k, f v, s z*: departemento sed apartamento, definitiva sed difini, redakti sed rigardi, fondi sed fundo, kongreso (sen *c*), via fia, filozofo sur sofo... Niaj bonaj lerniloj konsciigas pri la opozicioj ĉ - ĝ - ĵ - ŝ, pezaĵo pejzaĝo... Ne eblas trakti ĉiujn paronimojn (similajn vortojn): por tio vidu interalie Marinko Gjivoje: “Esperantonimoj”. Kaj la distingo de sinonimoj en kuntekstoj estus tre utila. Do restas laborperspektivo, ni ĝoju!

Manlibreto por kompreno de la realo

■ Fernando Pita

Steiner, Rudolf. *Praktika kulturo de la pensado*. Berno: W. Nüesch. 2011. 16 paĝoj.

Prezo ĉe UEA: 2,70 €

Kiam oni analizas la trajektorion de la homaj ideoj, iam oni konstatas, ke kelkaj el ili ne nur naskiĝis, maturiĝis kaj disvolviĝis, sed eĉ estis fuĝo por novaj ideoj kiuj, kelkfoje, gardas nur palan trajton kun siaj generintoj. Tio estas la kazo de la idearo konata kiel *antropozofio*: ekaperinta komence de la 20-a jarcento, danke al la laboro de sia plej grava disvastiganto, la aŭstro Rudolf Steiner, tiu kvazaŭreligia aliro al sciencoj, kvankam finfine ĝi estis flanklasita, formulis ideojn kaj praktikojn, kiuj estis larĝskale uzataj de novaj branĉoj de la Homaj (sed ne nur) Sciencoj.

Dum la 19-a jarcento, diversaj filozofi-religiaj skoloj naskiĝis sur la eŭropa grundo, kiel reago al la troa – kaj “sendia” – sciencismo de la pozitivisma skolo kaj, samtempe, kiel respegulado de novaj religiaj praktikoj kiuj, danke al la koloniismo, enpenetris la eŭropan kulturon. La mistika allogemo de orientaj – precipe hinda – kulturoj rapide disvastiĝis tra la tuta Eŭropo, sed ĝi same trovis, en la figuro de Helena Blavackij, kreinto de la *Teozofia Societo*, sian plej lertan disvastiganton. Tamen, post la morto de Blavackij, tiu movado iom ŝanceliĝis, kaj tiam Rudolf Steiner kreis novan grupon la *Antropozofia Societo*, kiu malsimilis al la antaŭa, ĉar ĝi donis pli da graveco kaj al la okcidenta kulturo kaj al la rolo de Kristo mem, kiel iniciatinto de diversaj el siaj ideoj. Tiel, antropozofio, kiel filozofia skolo, ĉiam

havis karakteron pli praktikan, turnitan al la ĉiutaga vivo de normalaj homoj, ol Teozofio mem.

Cele al popularigo de la antropozofia idearo, Steiner fariĝis lerta prelegisto kaj verkisto, kun pli ol 350 tekstoj, preskaŭ ĉiam rezultintaj el liaj prelegoj, pri diversaj aspektoj de lia skolo. Unu el ili, originale verkita en 1909, estas nun prezentita en tre bona Esperanta versio preparita de sia eldoninto, Willy Nüesch. La teksto, titolita *Praktika kulturo de la pensado*, pri-traktas diversajn temojn, kiuj hodiaŭ, pro la amasa disvastigo de falsnovaĵoj, akiras gravan konturon, ĉar ĝi estas manlibro kies celo estas instrui homojn aŭtonome pensadi.

Tiucele, la unuaj paĝoj de la prelego defendas la praktikeblecon de la antropozofio, kontraŭ tiu de la “praktika pensado”, kiu fine estas nenio krom tro pigra prudentemo aŭ, kiel definite de Steiner mem: “*sencela persistado en pereduko alproprigitaj juĝoj kaj penskutimoj*”. Ekirinte el tiu punkto, oni rapide transiras al distingo inter tiu “mekanika” pensado al la “vera pensado”, kaj, en tiu momento, la religia grundo de la antropozofio fariĝas videbla, ĉar la ideoj prezentataj de Steiner montriĝas kiel rimedo atingi tiun veran pensadon kaj kiel provo doni mistikajn kaŭzojn al logikeco, ĉar, laŭ li, “*estas ĉiam la nekredo kontraŭ l’o spirita en la mondo, kiu eĉ sur scienca grundo produktas la plej malbonan nepraktikon de la pensado*”.

Tiel, Steiner proponas, iom panteisme, ke oni provu enpenetri la objektojn kvazaŭ oni enmiksiĝus al ili; kio, fakte, ja ne multe distingas sin de tiuj praktikoj jam elmontrataj de jarcentoj fare de diversaj mistikistoj kaj aŭ teologoj – ĉi-kaze, estas grandega

simileco kun la “Spiritaj Ekzercoj” de Ignacio de Loyola, kreinto de la jezuita ordeno de la Katolika Eklezio. Kaj plie, Steiner same proponas, ke homo ja devas kontroli siajn pensojn, per ĝusta animsistemo, kio ŝajnas al ni sumigado de ia okcidenta versio de zenbudhisma meditado plus neŭrolingvistika programado. Tamen, kontraŭe al proponoj de zenbudhismo, estas en Steiner troa parolado pri io, kio estas atingebla nur per silento.

Post kiam oni konkeris la tutan regadon de sia pensado, kiel oni devas proceduri por analizi tion, kion ĝi produktas? En la respondo kuŝas la plej grava punkto de la tuta prelego, ĉar tie ĉi estas tre aktuala averto de Steiner: dum tiu praktika kulturo de pensado nepre devas ĉeesti atenta rigardado de la sinsekvoj, tiel ke oni same faru antaŭvideblaj la postsekvojn. Tio signifas, ke vera pensado povas ja esti komprenata kiel maniero analizi modernan sciencon kaj nuntempan realecon ankaŭ en maniero tre proksima al la skolastika metodo. (Diversaj legantoj nun povas kritiki tion, dirante ke la skolastika metodo estas ja mezepoka; tamen, ĝi ankoraŭ tre bone funkcias, ĉar ĝi permesas ke oni almenaŭ distingu inter veraĵo kaj falsiĵo; kio fariĝas tre valora vakcino en mondo plene kontagiita de falsnovaĵoj.)

Fine, kvankam en kelkaj momentoj piednotoj bonvenus por faciligi la komprenon de tiu mallonga, sed vere grava teksto, estas interese ke oni legu tiun verketon, por ke oni en ĝi eltrovu kelkajn retrovaĵojn de la tradukinto, s-ro Nüesch, kiel “l’o” kiel sinonimo de “tiu io”, kaj, eĉ plej grave, metodon por ke oni povu kompreni la realon, kaj la kernon de diversaj antropozofiaj ideoj.

Tiuj, kiuj deziras recenzi por la revuo *Esperanto*, estas invitataj kontakti la redakcion ĉe redakcio@revuoesperanto.org aŭ pere de la poŝtadreso, indikita en la kolofono.

Tiuj, kiuj ricevis varon por recenzo, estas petataj sendi la recenzon aŭ kontakti la redakcion.

Varojn ricevitaĵajn kaj nerecenzitaĵajn oni fakturos al la ricevinto.



Esperanta klasikaĵo pri homa lingvo

Haitao Liu

La Homa lingvo / Human language. William E. Collinson. Red. Angela Tellier, Wim Jansen. En la anglan trad. S. Davies. Rotterdam: UEA, 2019. Prezo ĉe UEA: 15,00 €.

La recenzata verko estas popularscienca libro pri homa lingvo. Se konsideri la tre proksiman rilaton inter homo kaj lingvo, ekzistas multaj similaj legaĵoj skribitaj en diversaj lingvoj. Esperantistoj ofte pli interesiĝas pri lingvaj aferoj. Tial, Esperante eldoni tian libron tute kompreneblas. Tamen, la historio de ĉi tiu libreto, kiu unuafoje estis eldonita en 1927, ne estas tiel simpla. Ĝi ne nur estas la unua Esperanta enkonduko pri ĝenerala lingvistiko, sed ankaŭ la unua Esperanta libro verkita de fama lingvisto, William E. Collinson. Kial oni reprenis ĉi tiun libron post preskaŭ 100 jaroj? Forme, kio estas la diferenco inter la malnova kaj nova eldonoj? Enhave, ĉu ĝi ankoraŭ taŭgas por hodiaŭaj legantoj? Jen du demandoj, kiuj kuŝas antaŭ ĉiuj legantoj.

La libro ne estas simpla represaĵo, sed dulingva eldono kun la angla traduko de Simon Davies. Por faciligi la legadon, la du redaktantoj Angela Tellier kaj Wim Jansen ne nur verkis enhave malsamajn antaŭparolojn en la angla kaj Esperanto, ankaŭ aldonis riĉajn notojn en du lingvoj. Strukturo, la paĝoj 6-22 inkluzivas diversajn antaŭparolojn kaj la biografion de Collinson; la paĝoj 26-201 la libreton en du lingvoj; la paĝoj 202-254 diversajn aldonojn de la du redaktantoj, ekzemple, mallongan enkondukon al la personoj menciitaj en la libro, notarojn en du lingvoj kaj referencaron en la notaroj, ktp.


Aldone al la antaŭparolo, postparolo kaj bibliografio, la libreto estas

dividita en naŭ ĉapitrojn kun la sekvaj titoloj: la naturo de la lingvo, skizo de fonetiko, la bestaj krioj, la infana lingvo, lingvaj ŝanĝoj, disiĝo kaj unuiĝo, fremdaj influoj, lingvo kiel karakterizilo de la parolantoj, la klasifiko de la lingvoj.

Kiel popularscienca libro, ĉi tiuj enhavoj daŭre allogas legantojn eĉ nunajn, kvankam fakte, manko de ĉapitro pri morfologio kaj sintakso eble estas iomete problema, ĉar ili preskaŭ estas esencaĵo en la nuntempa enkonduko pri ĝenerala lingvistiko. Pri ĉi tiu punkto ankaŭ Kees Hengeveld atentigis en sia antaŭparolo. Li kredas, ke ĝi povas reflekti Collinson, kiel la aŭtoro “interesiĝas pli pri la interna aspekto de la lingvo kiel dinamika objekto, ol pri ĝia ekstera aspekto kiel io statika.” (p. 9) Tamen, la aŭtoro eble ne samopinius kun la diraĵo de Hengeveld, ĉar la aŭtoro mem skribis “Ambaŭ flankoj, la ekstera, fizika kaj fiziologia kiel ankaŭ la interna, ricevos siavice konsideron en ĉi tiu verketo.” (p. 30) La diferencoj eble fontas el la fakto ke ili malsame komprenas la internan kaj eksteran aspektojn de la lingvo.

Laŭ la aŭtoro, lia verko celas al enkonduko en la ĝeneralan lingvistikon, kiun li difinas kiel “la studo de la plej gravaj principoj de la lingva evoluado kaj de la ĉeftraĵoj de la lingvo konsiderata kvazaŭ fiksa.” (p.32) Estas interese, ke la difino ankoraŭ validas en la hodiaŭa lingvistiko. Alivorte, por ni kredeblas ke la enhavo de la libreto ankaŭ taŭgas al nuntempaj legantoj, ĉar la celoj de ĝenerala lingvistiko, por serĉi la principojn (aŭ leĝojn) de la lingvaj evoluado kaj strukturo, apenaŭ ŝanĝiĝas dum la pasintaj 100 jaroj. Kompreneble, tio ne signifas ke ĉiuj ne ŝanĝiĝas en ĉi tiu scienco. Almenaŭ la metodoj por atingi la celojn progresas ege.

Kvankam mi ne povas multe eltiri la interesajn ideojn el la libro, kelkaj punktoj estas menciindaj. En la ĉapitro de la naturo de la lingvo, Collinson diris: “Ĉiuokaze la “leksikonaj” vortoj estas abstraktaĵoj. Ilia senco devas determiniĝi laŭ la frazo, en kiu ili estas enfiksitaj.” (p. 42) Kiel kompreni ĉi tiun frazon, tion la du redaktantoj klarigis piednote. Por mi, ĉi tiu frazo preskaŭ samas kiel la fama diraĵo de la filozofo Wittgenstein: “La signifo de vorto estas



ĝia uzo en la lingvo”. La simileco estis hazarda, kvankam esence ĝi reflektas ion necesan. Gravas, ke dank’ al pli bona plenumo de tiu ĉi ideo ol antaŭe, modernaj sistemoj de perkomputila lingva prilaborado bazitaj sur profunda lernado ege progresis. Ĉio montras, ke la aŭtoro vere tuŝis la naturon de la homa lingvo.

Teme pri la klasifiko de sonoj, la aŭtoro skribis: “Fakte la unuopa sono estas abstrakta mezformo konstruita per la penso el granda nombro da variantoj” (p. 82). Tio bone kongruas kun la ĉefa vidpunkto de la moderna kvanta lingvistiko: lingvo estas kompleksa adapta sistemo funkciigata de la homo.

Kiel denaska parolanto de la ĉina, mi povas facile kompreni la Esperantan tekston, kiun Collinson skribis antaŭ cent jaroj. Tamen, mi malfacile komprenas la demandon pri ŝafoj en la ĉina menciita sur paĝo 72. Mi ne scias kiel ligi ŝafon al feliĉo. Ĉu eble la ĉina lingvo ŝanĝiĝis tro rapide? La respondo eble estas jes, ĉar “Nenio restas senŝanĝa. La lingvo ankaŭ konstante evoluadas.” (p. 122)

La signifo de ĉi tiu libro estas ne nur diskonigi iujn sciojn pri homa lingvo al esperantistoj antaŭ cent jaroj. Multe gravas, ke la aŭtoro, kiel profesia lingvisto, enlibre uzas multajn ekzemplojn el Esperanto por klarigi la fenomenojn lingvajn. El tio brile montriĝas la fakto, ke Esperanto estas viva homa lingvo kaj “la graveco de lingvo kiel Esperanto por la lingvoscienco.” (p. 196) Ĉio ĉi ankoraŭ estas grava kaj interesa por hodiaŭaj legantoj.

Laste Aperis

Almanako Lorenz 2019. Rio-de-Ĵaneiro: SEA Lorenz, 2019. 192p. 24cm. Ilus. ISBN 9788586984204. Precipe artikoloj kaj eseoj. € 6,30

Avo kiu estas nepo. Roman Dobrzyński. Varsovio: PEA, 2019. 36p. 21cm. ISBN 9788390834061. Ilustrita biografio de la fama nepo de la aŭtoro de Esperanto. € 4,50

Bild-taglibro pri la Katastrofo en 2011 / Hisaichi junrei Enikkicho. Jasuo Hori. Maebaŝi: Horizonte, 2019. 48p. 30cm. ISBN 9784939088414. Mallongaj tekstoj kaj rilataj desegnaĵoj de la aŭtoro. € 8,40

Dziadek który jest wnukiem. Ludwik Krzysztof Zaleski-Zamenhof – szkic biograficzny. Roman Dobrzyński. Warszawa, Łódź: Polski Związek Esperantystów, 2019. 34p. 21cm. ISBN 9788390834085. Pollingva ilustrita biografio de la fama nepo de la aŭtoro de Esperanto. € 4,50

Egaleco kaj paco per Esperanto. Esperanton alkeiskurssi. Lars Forsman. Trad. el la sveda. Helsinki: Suomen Esperantoliitto, 2007 (3-a eld.). 129p. 21cm. Ilus. ISBN 9789529829026. Lernilo por komencantoj. € 9,90

Ĝesperanto za 10 časov. Oznakomitel'nyj blic-kurs. Boris Grigor'evič Kolker. Moskva: Rossijskij Sojuz Esperantistov, 2019. 32p. 30cm. Fulma kurso de Esperanto por ruslingvanoj. € 6,00

Evoluo de paradigmoj en scienco kaj tekniko. Partizanske: Espero, 2019. 256p. 21cm. ISBN 9788099902108. Kolekto de kontribuaĵoj prezentitaj dum la Konferenco "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", kiu okazis en Modra en oktobro 2018. € 7,50

Fabeloj de la neserioza heroo. Anna Striganova. Moskvo: Impeto, 2019. 47p. 14cm. ISBN 978716103054. Mallongaj (1-3-paĝaj) fabeloj, kun ilustraĵoj de la aŭtorino. € 3,00

Flug des Kakadus, Der. Trevor Steele. En la germanan trad. Ch. Cimpa. Wien: Phoibos, 2019. 346p. 20cm. ISBN 9783851612080. Germana traduko de romano pri la invado kaj okupo de Okcidenta Aŭstralio fare de britaj enmigrintoj. € 14,10

Jesa. István Nemere. Nyíregyháza: E-Asocio "Verda Stelo", 2019 (nova eld.). 192p. 21cm. ISBN 9786150041704. Kio okazus se Jesuo Kristo revenus sur la teron... kiel virino? € 8,40

Knabo kiu vivis kun strutoj, La. Monica Zak. El la sveda trad. C.-O. Selenius. Uppsala: La tradukinto, 2019. 216p. 18cm. ISBN 9789151916064. Knabo perdiĝis kaj vivas kun strutoj. Ĉu li volonte revenos en la homan socion? € 6,00

Ludwik Zamenhof okaze de la centa datreveno de la morto / A Ludwik Zamenhof nel centenario della morte. Aktoj de la kunveno Romo, 11 decembro 2017 / Atti del convegno Roma 11 dicembre 2017. Div. tradukintoj. Roma: Accademia Polacca delle Scienze / Biblioteca e Centro di Studi a Roma, 2018. 114+126p. 24cm. Dulingva: itala, E. ISBN/ISSN 9788363305628/02398605. Tekstoj de prelegoj de dek aŭtoroj. € 12,00

Mrguda. Petar Kočić. En Esperanton trad. B. Milićević. En la ĉinan trad. Wang Jingrong, Shi Linjuan. Banja Luka, 2019. 24p. 24cm. Trilingva eldono: serba, Esperanto, ĉina. ISBN 9789997664952. Romantika rakonto de bosnia klasikulo. Kun la originalo en manuskripta formo. € 3,90

Orm la ruĝa. Dua volumo: Hejme kaj en Oriento. Frans G. Bengtsson. El la sveda trad. S. Johansson. Uppsala: Eldona Societo Esperanto, 2019. 251p. 20cm. ISBN 9789185288465. La dua volumo de aventura kaj humurplena proza eposo pri la vikinga socio kaj la alveno de kristanismo. € 13,50

Pri adopto kaj Omaĝo. Juan Régulo Pérez k.a. El la hispana trad. L. Trujillo

Casañas. La Laguna: Sociedad Esperantista de Tenerife, 2019. 78p. 21cm. Ilus. ISBN 9788409117505. Traduko de parolado dirita okaze de la akceptado kiel adoptita filo de La Laguna, plus aldonaj tekstoj. € 7,80

Raportoj el Japanio 22. Marto 2018 – Februaro 2019. Hori Yasuo. Maebaŝi: Horizonte, 2019. 200p. 21cm. Ilus. ISBN 9784939088421. Raportaĵoj kaj aliaj tekstoj de la "Esperantisto de la jaro 2018". € 13,80

Senditoj, La. Francisco Cândido Xavier. El la portugala trad. G. Neves. Rio de Janeiro: BSF / SEA F.V. Lorenz, 2017. 269p. 21cm. ISBN 9788594661142. En 51 ĉapitroj la libro rakontas pri la spertoj de pluraj reenkarigiĝintaj spiritoj. € 9,60

Unu amo de Swann. Marcel Proust. El la franca trad. J.-L. Tortel. Chapecó: Fonto, 2019. 225p. 21cm. Amromano, kun membiografiaj aludoj. € 21,00

Vojaĝo de Onia. Japania. Kim Onnuri. Goyang-si: Larosa, 2019. 128p. 21cm. Ilus. ISBN 9791196244118. Legolibro bazita sur vojaĝo de la aŭtoro tra Japanio. € 7,80

DISKOJ

Bonvenon al Portugalio. Roman Dobrzyński. s.l.: La aŭtoro, 2018. 28 min. Filmo pri la lando de la 103-a Universala Kongreso de Esperanto. DVD. € 12,00

Guns of the Apocalypse. Verkis, reĝisoris kaj redaktis Christopher R. Mihm. Saint Euphoria Pictures, 2018. 88 min. Se la soleca viro ne agas, la homaro estas en danĝero. Dublita kaj subtitolita en E-o. DVD. € 7,50

Queen of Snakes. Verkis, reĝisoris kaj redaktis Christopher R. Mihm. Saint Euphoria Pictures, 2019. 69 min. Akcidente ricevita amuleto donas al sia ricevintino hororajn povojn. Dublita kaj subtitolita en E-o. DVD. € 7,50

La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 10% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.



Alvoko al partopreno en la 71-a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2020

En 2019, la nombro de la konkursoj ricevitaj rekordis kaj palindromis: 171. La Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA esprimas la grandan ĝojon spertitan de la gvida BK-skipo, pro ĉi sukceso, kaj instigas beletrulojn superi tiun rekordon konkurante per altkvalitaj verkoj en ĉi nova okazigo de tiu kultura evento, unu el la jam tradiciaj kaj plej ŝatataj en Esperantujo. La rezultojn oni anoncos kadre de la 105-a Universala Kongreso de Esperanto en Montrealo (Kanado). Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo ne fiksita.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 signoj (kvino da paĝoj).

Prozo, subbranĉo Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio Paula Adúriz.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ divers-persona): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. Aljuĝata estas nur unu premio, kiu nomiĝas Premio María Cuevas.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma

longo 400 x 65 signoj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio Luigi Minnaja.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2018. Aljuĝata estas nur unu premio.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2020.



Suso Moinhos, gajninto de la unua kaj dua premioj en la branĉo Eseo en 2019

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe la Sekretario, Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retroŝte al la adreso: sciosfero@gmail.com; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los Coterros 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Can-

tabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la konkerna libro al la adreso de la Sekretario, kaj tri ekzemplerojn al Ionel Oneț, Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Premioj: en la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €; Nova Talento 182 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la du subbranĉoj Mikronovelo kaj Monologo aŭ Skeĉo po 125 €.

Noto Pasintjare ni anoncis, ke la enkondukon de la du nove proponitaj subbranĉoj ni faras nur prove kaj ke ilia definitiva aligo al la BK-fakoj dependos de la reago de la BK-partoprenantoj. Nu, larĝe superinte niajn eserojn, la subbranĉa rikolto en 2019 (55 konkursaĵoj entute) ne nur pravigas la definitivon aligon de ambaŭ kategorioj de verkoj al la BK-fakoj, sed instigas nin starigi pli ol unu premion, ĉefe en la subbranĉo Mikronovelo, kaj Honorajn Menciojn en ambaŭ subbranĉoj.

Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA (http://uea.org/teko/reguloj/belartaj_konkursoj). La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2019, legeblas en la volumo Belarta rikolto 2019, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: <http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html>.

La premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj por la jaroj 2013-2018 haveblas en apartaj volumoj ĉe la libroservo de UEA. Ĉe <http://katalogo.uea.org>, entajpu "belarta rikolto" en la kampo 'serĉata verko /aŭtoro' por ricevi aldonajn informojn pri ĉiu volumo.





Furoraĵoj de la kongresa libroservo en Lahtio

■ Ionel Onet

Kun vendoj sumantaj 10 585,55 EUR, la ĉi-jara kongresa libroservo estis la plej modesta de la jardeko. Ĉi-sube estas listigitaj la 20 plej furoraj titoloj. La prezoj indikitaj ĉi-tie estas tiuj aplikitaj dum la kongreso (sen imposto!).

Ekz.	Titolo	Prezo (€)
77	<i>Poŝamiko</i> (B. Allée, K. Kováts)	4,25
55	<i>Internacia Kongresa Universitato 2019</i> (Red. A. Striganova, D. Ševcenko, A. Wandel)	13,75
13	<i>Pasporta Servo</i> (La listo de gastigantoj de TEJO, 2017)	6,00
12	<i>Baza Esperanta radikaro</i> (W. F. Pilger)	5,00
10	<i>Muminvalo</i> (T. Jansson)	10,00
10	<i>Esprimaro</i> (P. Desmet')	9,50
10	<i>Beletra Almanako 34</i> (Red. P. Daŝgupto, J. L. Jacobsen, I. Ertl, S. Moinhos, N. Ruggiero, A. Stecay)	8,25
10	<i>Mil unuaj vortoj en Esperanto</i> (H. Amery, S. Cartwright)	8,25
10	<i>La vundo</i> (B. Paz)	8,25
9	<i>Fabeloj de la neserioza heroo</i> (A. Striganova)	3,00

Ekz.	Titolo	Prezo (€)
7	<i>Guns of the Apocalypse</i> (DVD; Ch. R. Mihm)	9,00
7	<i>Jesa</i> (I. Nemere)	4,45
6	<i>Homa lingvo, La / Human language</i> (W. E. Collinson)	10,00
6	<i>Gerda malaperis!</i> (C. Piron)	5,75
6	<i>Internaciaj Ekzamenoj de ILEI/UEA</i>	3,00
5	<i>Historio de la Akademio de Esperanto</i> (C. Minnaja)	33,25
5	<i>Queen of Snakes</i> (DVD; Ch. R. Mihm)	9,00
5	<i>Ili kaptis Elzan!</i> (J. Valano)	8,50
5	<i>Esperanto per rekta metodo</i> (S. Marček)	7,50
5	<i>La knabo kiu vivis kun strutoj</i> (M. Zak)	6,00

Oficiala Informilo

PATRONOJ de TEJO

Britio: M. Peperell.
Italio: M. Concialdi.

DONACOJ

Ĝis la 1-a de oktobro
**Amsterdama Katedro
pri Interlingvistiko kaj
Esperanto**

Luksemburgo: C. Nourmont
500,00.

Nederlando: A. Bakker-ten
Hagen, L. Demmendaal,
H. Erasmus, M. Hemelaar,
B. Hengstmengel-Koopmans,
J. van der Hoek, T. Van Huis-
Staritsky, R. Koot,
M. Massar-van Diepen,
R. Moerbeek, M. Mueller,
B. Muizelaar-Borger,
I. van de Stadt, M. Verhage,

Anonima – 4762,00;
Esperanto Nederland 2000,00.
Usono: ESF 1336,00.
Sumo ĉi-jara: 8598,00.

Fondaĵo Ameriko

Britio: M. Sims 79,49.
Sumo ĉi-jara: 196,50.

Fondaĵo Azio

Japanio: Aihara M., Aoyama
A., Egawa H., Haŝiguĉi Ŝ.,
Saiki A., Sanpei K., Yazaki Y. -
po 16,89; Huzita T., Nakatu M. -
po 25,33; Isaki M. 84,44;

Moriwaki Y. 21,95; Sasanuma
K. 50,66; Sawaya Y. 21,11.
Div. malgrandaj: 4,48.
Sumo ĉi-jara: 1367,80.

Ĝenerala kaso

Francio: J-L. Tortel 20,27.
Japanio: Huzisaŭa E-Klubo
670,86.
Kanado: G. Greatrex 90,00.
Luksemburgo: B. Moon 62,00.
Svisio: R. Mettler 55,55.
Div. malgrandaj: 5,00.
Sumo ĉi-jara: 8674,35.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



Ni daŭrigu kune!

Kiel membro de UEA...

- vi kontribuas al la tutmonda kresko de Esperanto: UEA subtenas la movadon en multaj landoj kaj kunordigas la regionan agadon tutmonde;
- vi plifortigas la voĉon de la lingvo kaj la movado: UEA reprezentas la movadon ĉe UN kaj Unesko kaj pledas por justeco kaj egaleco sur la lingva kampo;
- vi subtenas la efikan instruadon de Esperanto: UEA eldonas modernajn lernilojn, kunlaboras kun la lingvoekzamena centro por la KER-ekzamenoj, donas financon subtenon al ILEI kaj aliaj kunagantoj;
- vi kunaktivas por Esperanto kaj daŭripova mondo: UEA donas multajn rimedojn kaj okazojn por vastigi la konojn kaj kapablojn de aktivuloj.

Konkrete, de UEA vi ricevas:

- revuojn (*Esperanto* kaj ĝis inkl. 35 jaroj: *Kontakto*), kiuj traktas aktualajn temojn de la movado kaj la monda socio;
- kongresojn, kie esperantistoj el la tuta mondo kune kulturumas, kleriĝas kaj kunplanas agadon;
- aktivulajn retojn kaj servojn pri ĉio ekde libroj ĝis reprezentado.

Aliĝu al UEA por la jaro 2020 nun! Aliĝilon vi trovos kun ĉi tiu revunumero. Vi povas uzi ĝin por remembrigi vin mem kaj vi povas transdoni ĝin ankaŭ al aliaj (aŭ uzi la retan aliĝilon ĉe: <http://uea.org/alighoj/alighilo>)



Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA! Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton al akcepto en la Universala Kongreso. La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>